

MARTO-APRILLO 1934

Aperas dekfoje dum la jaro

TRIA NUMERO



**Literatura • arta • ilustrita • revuo**

Redakcio kaj administracio: Hungarujo, Budapest, IX., Mester ucca 53, V. 5

**Averto:** Manuskriptojn la redakcio ne redonas. La rajton, fari en ĉiu ensendita manuskripto stilajn korektojn la redakcio rezervas por si, se la verkinto aŭ tradukinto anticipe ne protestas.

La redakcio akceptas nur unuflanke maŝinskribitajn artikolojn kun sufiĉe larĝaj margeno kaj liniaj interspacoj. Escepte tamen estas akceptataj manuskriptoj kun *desegnita* aŭ tre klare skribitaj literoj.

## NIAJ ELDONAĴOJ

### Verkoj de JULIO BAGHY:

Dancu Marionetoj, noveloj tolb. 5.40, broŝ. — —	3.40
Migranta Plumo, noveloj tolb. 4.60, broŝ. — —	2.70
Viktimoj, romano tolb. 7.40, duont. 5.60, broŝ. —	5.—
Hura! romano tolb. 10.— broŝ. — — —	7.40
Preter la Vivo, poemaro tolb. 3.—, broŝ. — — —	2.—
Pilgrimo, poema o tolb. 3.—, broŝ. — — —	1.80

### Verkoj de KOLOMANO KALOCSAY:

Lingvo, Stilo, Formo tolb. 4.90, broŝ. — — —	3.—
Malkara eldono bind. 2.50, broŝ. — — —	1.50
Streĉita Kordo tolb. 5.70, broŝ. — — — — —	4.—
Rimportretoj tolb. 4.50, broŝ. — — — — —	3.—
Eterna Bukedo, Internacia poemantologio, 352 paĝa. Duonlede bindita — — — — —	11.30
Madách: Tragedio de l' Homo luksa 5.50, simpla Petöfi: Johano la brava	4.—
luksa bind. 7.—, simpla bind. 5.20, broŝ	1.50
Goethe: Romaj elegioj; La Taglibro, silkebind. — bind. 3.—, broŝ.	5.— 2.—
Hungara Antologio bind 14.—, broŝ. — — —	12.—
— G. Waringhien: Kiel fariĝi poeto aŭ Parnasa Gvidlibro bind. 5.—, broŝ. — — — — —	3.60
Dante: Infero bind. 11.—, broŝ. — — — — —	8.80

### ALIAJ VERKISTOJ:

S. Asch—l. Lejzerowicz: La Sorĉistino el Kastilio romano bind. 5.—, broŝ. — —	3.50
Grenkamp — Brzekowski: Pri l' Moderna Arto bind. 9.—, broŝ.	7.—
J. Forge: Mr Tot aĉetas mil okulojn — Romano bind. 5.80, broŝ.	4.—
Francisko Szilágyi: Poemaro el Hungarlando bind. broŝ.	2.50 1.50
Francisko Szilágyi: Trans la Fabeloceano novelaro bind. 4.50, broŝ —	3.—
Szilágyi: La Simpla Esperanto (gram. por hung.) broŝ.	1.35
Teodoro Schwartz: Modernaj Robinzonoj broŝ. —	1.50
La Pentroarto en la malnova Hungarujo, kun 95 ilustrajoj duonlede bindita — — — — —	15.50
L. Totsche: De Paĝo al Paĝo studoj bind. 4.—, broŝ.	2.50
Engholm: Homoj sur la Tero romano bind. 5.—, broŝ.	3.60
Kenelm Robinson: Homarisma Laboro broŝ. — —	0.60
I. Ŝirjaev: Peko de Kain broŝ. — — — — —	1.—
H. Weinhengst: Turstrato 4. romano bind. 5.50, broŝ	4.—
E. Aisberg: Fine mi komprenas la radion! bind. — broŝ.	6.— 4.50
K. Karinty—L. Totsche: Vojaĝo en Faremidon broŝ	1.20
K. R. C. Stürmer: El Notlibro de Praktika Esperan- tisto. bind. 4.—, broŝ. — — — — —	2.50
Hungara Slosilo — — — — —	0.18

### Prezoj en svissaj frankoj!

Aldonu 10% por sendkostoj

## Niaj reprezentantoj:

- AUSTRIO:** Rudolf Foltanek,  
Wien, I. Herrengasse 2—4. Poŝtkonto nro 19.704
- AUSTRALIO:** L. E. Thomson, p. a. R. G. Rawson,  
Melbourne 185 Exhibition Str.
- BELGUJO:** Belga Esperanto Instituto Antwerpen, Kleine  
Hondstraat 11. Poŝtkonto nro 1689.58.  
Flandra Esperanto-Instituto. Kortrijk, Marckesteeweg 18,  
poŝtkonto nro 3268.51.
- BRITUJO:** Alec Venture,  
Mitcham, (Surrey) 42 Hawkes Road.
- BULGARUJO:** Centra Librejo »Esperanto«  
Sofia str. Maria Luiza 38.
- ĈEHOSLOVAKIO:** Otto Sklenčka, Hradec Kralové.  
Poŝtkonto nro: Brno 110.878.
- DANUJO:** Isešek, sro L. Friis Aabyhöj, Frodesvej 21.  
Poŝtkonto nro: 16295.
- ESTONIO:** Helmi Dresen, Tallin, Poŝtkest 6.
- FRANCUJO:** Centra Esperanto Librejo  
Paris 6e, 11 rue de Sévres  
Poŝtkonto: Libraire Centrale Esp.-iste, Paris nro 19601.  
S. Grenkamp-Kornfeld, Paris XIV-e 117 Bd. Jourdan.
- GERMANUJO:** Poŝtĉekkonto de Vilmos Bleier,  
Berlin 138084
- HISPANUJO:** Ferdinand Montserrat,  
Barcelona, str. Provenza 75, 2—3a
- ITALUJO:** Itala Esperanto Centro Milano, Galleria  
Vittorio Emanuele II. 92  
Poŝtkonto: Milano, c/c postale 3/18715.
- JUGOSLAVUJO:** Sudslava Esperanto Servo  
Zagreb, Primorska 11.  
La Suda Stelo Slavonski Brod Poŝtfako 44.
- NEDERLANDO:** Leo Moreau,  
Arnhem, Raapopsche weg 55. poŝtkonto nro 13843.
- NORVEGUJO:** Norvega Ligo Esp-ista,  
Oslo, Bergsliengata 11.
- POLUJO:** Halina Weinstein, Warszawa, str. Leszno 99.  
P. K. O. W. Nr. 27867.  
Izrael Lejzerowicz, Lodz, Skwerowa 20.  
Poŝtkonto nro W. P. K. O. 68273.
- RUMANUJO:** Esp.-Instituto Rumana, Cluj, str. Bravilor 15
- SVEDUJO:** Förlagsföreningen Esperanto,  
Stockholm, 1. Fack 698 Poŝtĝirokonto nro 578.
- SVISUJO:** Nova Esperanto Grupo, sro Hans Pfiffner,  
ST. Gallen C. Gallusstrasse 34.  
Poŝtkonto: Nr. IX. 53.44.
- JAPANUJO:** Japana Esperanto Instituto  
Tokio, Hongoo—Motomaĉi I. Poŝtkonto: Tokio 11.325.
- USONO:** Amerika Esperanto-Instituto.  
Madison, (Wis.) Sherlok Hotel
- ALIAJ LANDOJ** ne menciitaj ĉi tie, bonvolu sendi poŝt-  
mandaton al P. K. O. Polujo, Krakow Nro 403148  
Administracia Literatura Mondo. Internaciajn poŝtajn  
respond-kuponojn ni akceptas en la valoro de 0.30 sv.  
fr. por unu. Aldonu 10% por sendkostoj.

# Virino, kiu plaĉis al mi

— JANIS EZERINŠ —

Teorie mi ŝatas la homojn kaj povas diri, ke inter ili estas multe da belaj ekzempleroj. Sed de la tempo, kiam mi en anatomiejo unufoje desegis kruron de kadavro kaj poste dum tuta vintro okupis min pri senhavigado, mi senkonscie sulkigis la frunton kaj la mondo igis por mi multe pli senenhava.

Ho, iufoje estis tiel neelteneble, ke eĉ straton transiri mi ne povis. Ĉiun preterpasanton mi kuŝigis sur la marmortablon. Al mi ŝajnis, ke mi konas ilin pli ol necese, ke iliaj malpuraj sekretoj por mi plu ne estas sekretoj. Floranta virino transkuris la trotuaron, kaj mi iel subite ekpensis, ke en ŝia akselo pusoplenas abomena abceso. Ĉu ofte ne estas tiel? Ĉu mi ne estis tion vidinta? Jes, jes — fantazio ĝi ne estis, kaj pekema fantazio eĉ ne tiom. Kaj jen, ĝuste tial ĉio ŝajnis abomene malbona. Duono de la ĉi-teraj belaj por mi plu ne ekzistis. Mi estis perdinta tion, kion oni nomas sento de diskreteco kaj sen kio nenio bela estas bela kaj nenio senmanka — senmanka. Kiam la junaj teologoj, rigardante la pentrandan bruston de iu sinjorino asistantedzino, ekhinnis la Altan Kanton de Salomono, mi povis noti nur la nombron de ŝiaj laktoglandoj, kaj tiu tute ne ŝajnis laŭdinda. Vere, bonaĵo ne estis, kaj neniun homo faras en similaj okazoj tiel. Sed por mi formo plu ne kaŝis la enhavon, animo la karnon, kaj tiun malbenon forskui mi ne kapablis.

Efektive, sole en formo montriĝas la animo, en la mildaj movoj de l' membroj, en mimiko, en gestoj, en neekspikebla cerboproduktado; kaj ĝia tasko — interalie — estas forkaŝi la altrudeman karnon, ĉi tiun viandopeccon, tiom plezurigantan la hirurgojn. Sed por mi ĝi jam kaŝis plu nenion.

Dume mi ĝenis min demandi la kolegojn, kion sentas ili, vizitante la kadavrejon. Cetere tiu demando ŝajnis superflua, senŝignifa. Inter ili estis aŭ Don-Juanoj, kiuj povis resti fraŭloj nur pro tro frua senfortigo, aŭ homoj, kiuj povis ĉiutage skribi al virinoj tiujn netolereble malsagajn leterojn, kiuj odoras je bebo.

Ili estis feliculoj, ili nenion povus respondi.

Tuj, kiam en parkoj komencis fajfadi la merloj, mi kure rapidis for de la urbo, pensante neniam plu reveni en la inferon de l' anatomiejo — tiom min suferigis la lasta vintro. Mi prenis kune neniun el la libroj, en kiuj sur ĉiu paĝo amasis rompitaĵoj ostoj, naskantaj virinoj kaj en frenezo malfermegitaj buŝoj. Eĉ la poŝtranĉilon mi ne kunprenis.

Tutan someron mi laboradis kun la hejmanoj sur herbejoj kaj agroj, dum tutaj tri monatoj mi pensis nur pri fojnejoj, fojnamasoj kaj la bruna trifolio. Neniun venis al mi pro dentodoloroj aŭ reŭmatismo, kaj tio estis bonega. Mi vivis kiel ĉevalido sur paŝtejo — senzorgan kaj sanigan vivon. Kaj finfine mi multe ŝanĝigis: la vangoj igis kvazaŭ pambuloj; haŭto — kvazaŭ salika ŝelo. Kaj ne nur tio. Kiam mi aŭtune revenis en la urbon (mi eĉ ne pensis plu pri la antaŭa decido), okazis io nebla: mi ekvidis *virinon, kiu al mi plaĉis*.

Estis proksimume la dua horo. Mi sidis en parko, kiam ŝi preteriris. Kaj, kvankam neniun ankoraŭ nomis min facilanima, en tiu momento miaj pensoj estis tre proksime al tiu limo. Vidu, mi diris al mi, jen estas la sola kreaĵo, kiu post tiom da tempo impresis vin per sia apero. Ĉu vi ne sentas, ke viaj oreloj brulas kvazaŭ elektraj lampetoj kaj la koro dancas laŭ ĉiuj

reguloj? Malsagulo! do kion vi pensas? Tiel oni ne akceptas tiajn maloftaĵojn!

Jes, ĉu mi do devus leviĝi? Mi levis min. Kaj... kaj mi devus iri? Ne, efektive, tion mi ne povis. Ludi ĉi tiun mokfajfatan farson? Ne, tio superis miajn fort-ojn. Eble alvoki iun bubon, ke li sekvu ŝin ĝis la hejmo? Aŭ, finfine — fari nenion!

Sed apenaŭ la fraŭlinon forkaŝis parkangulo, okazis ree io neatendita; mi ekmovigis kaj faris paŝon antaŭen! kiel strange la tero sub mi ne fendigis! Kaj neniun ekridis! Mi faris ankaŭ la duan paŝon kaj plu ne lasis ŝin malaperi. Nu, kion do finfine — ja diversajn vojojn necesas iri!

Mia miraklo paŝis iom antaŭ mi. Ĝi iris — jes, ĉu mi povas priskribi, kiel ĝi iris! Sed tion mi scias, ke ĝi tirus min tra la tutan urbon, se ĝi ne enirua jam post du stratoj iun flavetan domon. Post momento ankaŭ mi estis tie. Mi metis unu piedon sur la ŝtonan ŝtupon kaj ree ĝin retiris. Tio, verŝajne, estis tre ridinda, ĉar la kortisto, kiu iradis antaŭ la pordego, demandis:

— Sinjoro, kion vi deziras?

La kortisto ŝajnis esti bona homo. Mi diris:

— Mi devas renkonti la fraŭlinon, *kia ĵus eniris*.

— Fraŭlinon?

— Nu jes!

— Tiu fraŭlino ne loĝas ĉi tie, ŝi nur venadas por tagmangi.

Mi, verŝajne, nekredeme tiris la ŝultrojn, kaj li iom pli grave daŭrigis:

— Ĉiu homo ja tagmanĝas! iu hejme, iu en restoracio, sed la fraŭlino venadas al madame Tupailk.

— Al kiu madame?

— Nu, al nia madame, ŝi havas pensionon kaj oni tagmanĝas ĉe ŝi.

Nun la afero estis klara. Komprenoble, tie atendi mi ne povis; do mi adiaŭis kaj iris plu. Dum la tuta posttagmezo mi vagadis kvazaŭ en arbaro. Mi zunkantis ĉiujn sciatajn melodiojn; ili ne estis multaj, sed mi komencis refoje. Kiam la suno jam dronis post la tegmentojn, mi devis la promenadon desigi. Ja kiom longe oni povas tiel vagadi? Post duonhoro la flaveta domo ree staris antaŭ mi, sed nun mi eniris ĝin, kvazaŭ ĝi estus aŭkciota kaj mi intencus ĝin aĉeti. En la dua etaĝo aromis kumino. Jes, tie estis pensiono; mi sonorigis kaj petis, ke venu la *madame* mem. Honoron al la honorinda — ŝi estis laŭaspekte mastrino kiel decas. Kun tuta respekto mi eldiris la deziron, esti akceptata en la pensionon. Ĉi tiu aroĝaĵo igis dezirinda min pli bone rigardi, kaj ŝi petis min enveni.

— Sed mi devas diri, ke ĉi tie oni ricevas nur tagmangojn.

— Absolute sufiĉe. Mi manĝas nur unufoje tage.

Tiu deklaro ŝin maltrankviligis.

— Tio... tio estas tro malmulte.

— Nu, kiel oni rigardas la aferon. Iuj el miaj kolegoj tute ne manĝas.

— Je-es, — eligis ĝemspiro, — kompatinduloj. Nu, pro tio ili havas pli da tempo por studi. Vi ja studas?

— Tute ĝuste.

Kaj ree, diablo forportu, al ŝi ne plaĉis, ke mi havis la aroĝantecon studi.

— Nu, tiel... Vi devos antaŭpagi por unu semajno.

— Estimata, eble vi konsentus akcepti por du?

Per tio la interparolo estis preskaŭ finita. Ŝajne al mi estis pardonitaj ĉiuj mankoj, ĉar la mastrino eĉ lumigis en koridoro lampojn, per ke mi en mallumo ne puŝalu.

La sekvan tagon mi alvenis kun ioma malfruigo. Loko por mi estis rezervita kaj mi, riverencinte al teleeroj kaj forketoj, okupis la seĝon. La interparoloj ĉe l' tablo subite ĉesis, kaj tio igis min senti min iel kulpa. Strange, kvazaŭ mi ne povus malsati, kiel la aliaj! Kaj ni mangis kvazaŭ koleraĵ. Teleroj tintadis, kuleroj frapigadis, kaj se iu aŭskultus post la pordo, li supozus, ke ĉi tie estas ne la pensiono de madame Tupsik, sed telegrafkontoro aŭ skribmaŝina oficejo. Mi kaŝe alrigardis la samtablojn. Jam multfoje trompita de l' fato, mi tute ne surpriziĝis, se mi ne ekvidus inter ili mian miraklon. Tamen ĉi tiun fojon la fato kondukis kiel vera gentilhomo. Mia fraŭlino sidis, jam fininte mangi, ĉe l' tabla fino, kaŝinte la pugnetojn sub la mentono. Ke la malbona! — mi tamen ne kapablis ŝin pli fikse alrigardi! Ĉu tio signifas, ke mi ankau nun estas sub ŝia potenco?

Dume la ceterajn mi observadis tute senĝene kaj finfine sukcesis kalkuli tri sinjorinojn kaj sep sinjorojn. Ili ŝajnis jam tiom emancipiĝintaj, ke ili ne ligis siajn profesiojn en kravatojn, kvankam ĝenerale nenio elstara ĉe ili rimarkigis. Nur unu sinjoro diferencis de la aliaj, similante fieran rosmaron — tiel mirinda estis lia vizago kaj la peze pendantaj lipharoj.

Ĉe la disiro mi alrigardis mian miraklon kaj facile salutkinigis. Ni ja estis samtabloj kaj mi kuragiĝis fari tiun etan escepton. Sed ŝi, verŝajne, tion tute ne atentis.

Jes, kion do mi povis fari?

Jam baldaŭ mia ĉeesto plu ne genis la pensionanojn de madame Tupsik kaj ili rekomencis sian gajan konversacion. El tiu mi baldaŭ eksciis, ke la rosmaro tute ne estas rosmaro, sed, pro tolstoĵismo, degradita instruisto, dum la ceteraj staras inter raportisto-komencanto kaj agente de antaŭ nelonge bankrotinta firma.

Ili ĉiuj estis tre parolemaj, kaj iufoje estis malfacile diri, ĉu ili pli mangas aŭ parolas. Nur pri la maljuna pedagogo oni povis certe diri, ke li nur mangas.

— Vi devus pagi por la tagmango duoble pli, — rimarkigis la najbare sidanta pensionano.

— Tute ne, sinjoro sekretario, — profunde gravis el sub la lipharoj, — Tolstoj maĉis ĉiun mangopecon tridekfoje, mi — certe, certe, tridekkvinfoje.

— Kalkulite? — ekridis alta voĉeto.

— Kalkulite, — obtuzis la respondo, — krome, infanoj, vi devas scii, ke parolante kaj ridante dum mango oni facile povas misgluti.

Nun ankau mi, preskaŭ la unuan fojon, ekpartoprenis la etablan konversacion, dirante, ke mi pretas al ĉiu gajemulo eltiri la misglutitan oston. Sed tio ne estis tre prudente farita. Ridante oni demandadis min:

— Ĉu vi estas sanitaristo? sanitaristo? — pleje tion ripetadis iu el la fraŭlinoj, celante ofendi mian eluzitan studentĉapon.

— Veterinaro, — mi respondis.

— Jen kiel! — ekkriis la vantema fraŭlino kaj diris plu nenion.

Kompreneble, ŝi meritis tian respondon.

Sed mi tre malkontentis pro la fiaskinta debuto,

pleje min turmentis tio, ke mi eĉ unu paŝon ne pli-proksimiĝis al mia infano. Mi ne sciis, ĉu kulpigi min aŭ la gajan kompanion, sed la tagmangoj venis kaj pasis kaj ni tuj disiris ĉiudirekte. Ĉu mi do venadis nur por la kotletoj? Tute kontraŭe, mi ja iufoje eĉ peceton ne englutis. Ŝi, kiel komence, sidis ĉe la fino de l' tablo. Iufoje mi alparolis ŝin kaj ŝi same afable respondis.

— Ĉu mi rajtas proponi salon? Eble pipron?

— Dankon, mi ĉion havas.

Jen, tiel ni interparolis. Gardu Dio kontraŭ en-amigo homon, kiu de tiaj aferoj absolute nenion komprenas!

Mi ja eĉ ne sciis, kiel ŝi nomigas kaj kie ŝi loĝas. Tiu malgranda sekreto ĉe la tablo ja baldaŭ malkaŝigis. Sed tio ne multon signifis. Ja ĉiu homo estas iel nomata kaj ĉiu homo ie loĝas. Kaj ŝi, jen, estis fraŭlino Saulite, loĝis ie en urba periferio, sed oficis en iu angla entrepreno kiel tradukistino.

Kiam mi konvinkigis, ke la pensiono de madame Tupsik ne estas loko, kie oni povus ekplekti pli intimajn rilatojn, mi decidis skribi leteron. Estas honeste, sed finfine mi tion efektive faris. Ĝi estis la unua fojo en mia vivo; do neniu povas riproĉi, ke mi ne kuragiĝis tuj malkaŝi mian nomon, sed petis adresi la respondon al ekspedejo, kie mi ĉiusemajne vizitis amikon.

Mi skribis, ke homo sur la tero estas nenio eksterordinara, sed ke ŝi estas io eksterordinara inter la homoj — tion mi povus eĉ juri. Mi aldonis, ke genadi ŝin per rendezuoj mi tute ne volas, ĉar mi sufiĉe ofte ŝin vidas en la urbo, pro kio mi estas senfine danka al la fato. Sed ŝi ne estu kompatema, se ŝi havas ian sedon.

Al mi ŝajnas, ke tiu ne estis malbona komenco. Ĉar kial do oni nepre sekvu la famajn ekzemplojn, kiuj estas presataj en la finoj de la plenaj verkaroj, kaj kiuj nur pravas, ke eĉ tute prudenta homo iam povas igi malsagulo?

Kaj jen, post kelkaj semajnoj estis jam interŝanĝitaj same multaj leteroj. Komence ili estis mallongaj, abruptaj, preskaŭ oficialaj, kiajn guberniestro sendas al alia guberniestro. Sed iom post iom senvole ensteligitis pli intimaj tonoj, kvankam sen troa sincereco.

Verdire, nenion mi tiel hontas, kiel sincerecon, kiun oni povas kune kun sekvinberoj sendi perpoŝte. Vera kaj nemiskomprenbla ĝi, kredible, povas esti nur, kiam mano manon ekhulas... kvankam pri tio konvinkigi mi neniam povis. Sed sinfido, fiero kaj memstaraj opinioj en miaj leteroj ne mankis, kaj tio ofte proksimiĝas la homojn pli, ol dokumentita parenceco. Ja eĉ dueloj, kiuj loĝas en diversaj urboj, fine kurvenas almenaŭ je tridek paŝoj. Ni proksimiĝis kiel senmalajmatalantoj, kaj estis tiel bone, ke ni havis proprajn opiniojn kaj propran mondkoncepton. En miaj argumentoj ne mankis akraĵoj, kiuj povis vundi, kaj fervoro, ĉar ni aspiris esti indaj unu por la alia.

Sed en la pensiono de madame Tupsik mi rimarkis ĉe ŝi neniam ŝanĝojn. Gajeco regis kiel ĉiam, ni renkontigis kaj disigis kiel antaŭe.

Ioman konfuon kaŭzis nova pensionano, kiu deziris esti tre laŭetiketa kaj alparolis ĉiujn: miajn sinjorojn, miajn sinjorinojn. Duoklano, duonteatremulo, li ĉiam rakontadis anekdotojn, kaj, verdire, al la plejmulto tio plaĉis. Pro hazardo li sidis apud fraŭlino Saulite, kiu ankautis lian baliladon kun evidenta malplaĉo. Ofte li petis la virojn eliri en apudajn ĉambrojn,

# ĈINAJ POEMOJ

— Tradukis: Saint Jules Zee —

## MIA HOMO.

*El Si-King aŭ Libro de Poezio.*

Mia homo, brava homo,  
Vera gloro de l' nacio,  
Lanco en la mano, marŝas  
Antaŭ l' reĝa procesio.  
De foriro via ĉesis  
La hararon mi aranĝi,  
Ĉu pomado al mi mankas?  
Ve, al kiu plaĉu jam ĝi!  
Pluvos certe, pluvos certe, —  
Ree brila sun' jen pendas.  
Sopirante al vi, kara,  
Kardoloron mi ne plendas.  
Kiel oni post la ĉambro  
Plantu forĝessukan floron?  
Ĉar sopiri al vi, kara,  
Kaŭzas al mi kordoloron.

## POPOLKANTO

*Han-dinastio (206. a. K.)*

Mi volas kun vi amikiĝi,  
Kunvivi, neniam disiĝi.  
Ĝis monto solvigos je cindro,  
Sekigos la akv' en river',  
Fulmtondros rulbrue en vintro,  
Kaj falos la neg' en somer',  
Kuniĝos ĉielo kun ter':  
Nur tiam finiĝos por ni la afer'.

Ĉar, li diris, li havas ankaŭ tiajn aferetojn, kiujn aŭskulti kapablas nur sinjorinoj. Tio lasis konkludi, ke la spritaĵoj de tiu sinjoro jam elĉerpigis, kaj dank' al Dio, ĉar jam tro li tedis. Sed la deziro esti en ĉies atento instigis lin serĉi ion novan. Demonstrante sian kuragon li nun ĉiam ĝenadis la fraŭlinojn, ĝis post iu nekontentiga tagmango li deklaris, ke deserton malhavi li ne kutimas, kaj antaŭ ĉies okuloj kisis fraŭlinon Saulite. Plorgema ekkrio, la knabino flankenkuris.

— Vi, koĉero! — mi ekkriis, saltlevigis kaj regalis lin per pugnobato.

La kanajlo ne esperis helpon kaj malaperis. Sed fraŭlino Saulite, tremante, kun larmoj en la okuloj, dankis min.

— Ĝi estis mia devo, fraŭlino.

— Mi timas eliri sur la straton, — ŝi daŭrigis.

— Mi vin akompanos.

Kune kun la aliaj ni forlasis la pensionon. Mi publis. Mi iris apud ŝi, mi povis tuŝi ŝian vestaĵon. Efektive, en la koro mi estis danka al la stulta arroganto, kiu per sia ŝvelanta nuko solvis unu el la plej malfacilaj problemoj.

— Ĉu vi iras al la oficejo? — mi demandis.

— Si estis tiel ĉagrenita, ke ŝajne ŝi eĉ ne aŭdis min.

— Ne pensu, ke okazis io atentinda!

— Ja ne, ne; sed estis tiel abomena.

— Estis kaj ne estas.

Mi vidis, ke ŝiaj palpebroj ektremas kaj la okuloj profundigas en ombron. La interparolo rompigis. Sed silenti estis tiel terure malsage. Al ŝi ne estis facile, sed, diablo forportu, konsoli estas rentoble pli malfacile, almenaŭ pli ridinde. Kaj mi diris:

— Vere, pro tiu bagatelo vi jam, ŝajne, mortas!

— Tiel terure ja ne estas.

— Kompreneble, kaj se okazis io malbona, do nur tio, ke kanajlo ricevis ion, kion meritis multe pli inda homo.

## POEMO.

*Tau-Cien (365—427)*

Sennuba estas la ĉiel' vespera,  
Printempa brizo blovas tute milde.  
Ebria kvazaŭ de la bela nokto,  
Knabino ĝis tagigo kantas birde.  
Profunde ŝi suspiras post la kant',  
Homkoren forte tuŝis jena penso:  
La luno blanke brilas en nubar'  
Kaj floroj pompas en la foli-denso:  
Ja ĉiuj la momenton glorie festas,  
Kaj, poste tuj, al ili kio restas?

## KANTO DE NORDA POPOLO.

*Ĉirkaŭ 5—6. jarcento.*

Kvinfutan glavon antaŭ tagoj mi aĉetis,  
Kaj ĝin pendigis sur kolonon centra-halan.  
Tri fojojn mi ĝin mankaresas ĉiutage  
Kaj ĝin pli amas ol knabinon dekkvinjaran!

## PRINTEMPA MALGAJO.

*Kin Can Su (ĉirkaŭ 9. jarcento).*

Forpelu jam la najtingalon,  
Ke ĝi ne trilu sur la branĉ'  
De l' tril' rompigis mia songo  
Kaj ne gisvenos ĉe l' fianĉ'.

— Kion? — ŝi subite ekridis. — Ĉu vi pensas la baton?

— Ne, ne, mi pensas ion alian.

— Si rugigis, sed tamen ni ridetante alrigardis unu la alian.

— Ne parolu tiel, — ŝi diris, — mi vin petas.

Al mi ja estis egale, pri kio paroli. Kaj efektive, ĉu ne estas sendiference, pri kio oni parolas — pri hundo, pri kato aŭ pri brasiko — en ĉio ja respeguligas homo, se tiu nur estas homo.

— Ĉu vi rapidas al lekcio?

— Mi volonte ankoraŭ akompanus vin.

— Ne, tio nun jam ne estas bezonata.

— Si etendis manon kaj ankoraŭfoje dankis. Tion ŝi faris tiel kore, ke mi eĉ konfuziĝis.

— Ho, vi ankoraŭ ne konas miajn pensionanojn! Ili ĉiuj starigus apud tiu, se ili ne ektimus. Do permesu danki vian helpon pli, ol mi dankus en alia okazo.

— Bonvolu, bonvolu, se tio faras al vi ĝojon.

— Faras, — kaj, kapklina salutinte, ŝi eniris flankstraton.

Do, nun mi povis iri hejmen. Sed ĉu tio decus post tia okazaĵo? Ankoraŭ dum tuta horo mi vagadis, pensante: jen, kiel stranga estas la amo! Vi pretus al homo eĉ ripojn enrompi. Sed apenaŭ manon etendi vi kapablas. Jes, kion fari!...

Tamen la tempo mem helpis al ni. De tago al tago niaj rilatoj igis pli intimaj. Eĉ en la pensiono ni tute malkaŝe elmontris atentemon unu al la alia. La sentaŭgulo plu ne montriĝis, kaj ni sentis nin liberaj kaj senĝenaj.

Tiam venis sur la teron grandioza oktobra dimaŭco. Estis prugno kaj frosto. Sur la arboj ardis ĉiuj jarsezonoj: flava kaj blanka, purpura kaj verda. Ni iris laŭ la ĉefa strato kaj malaperis en kampojn. Niaj paŝoj hruis sur la frostinta tero, kvazaŭ tuta armeo marŝas. Sed ni estis nur du. Efektive. Ĉiuj ceteraj

restis je fore, for, kvazaŭ en la alia fino de l' mondo. Kaj se ni nun ekdezirus fari unu al alia malbonon — neniu nin savus. Kaj se ni dezirus bonon... efektive, ĉion, kion ni havis, ni povis doni nurnure unu al la alia — rigardon, mienon, voĉon, sentiencan mangeston. Tio estas stato de la supernatura ekstazo, kaj pro tio, ŝajne, oni ĝin tiel ofte uzas. Tio estis pilgrimado de unu al la alia, eĉ se ni irus flank-de-flanke al la geheno mem. Sed kial do iri al tia malbona loko, ja ne malikas en la mondo aĉaraj, montoj, mire belaj valoj!

Vento fluis rankonten, kurbdorsaj ni borigis en ĝin.

— Kiel bone estas! — ŝi diris.

— Kio?

— Nu jen, ke ni tiel — pro nenio — ekintencis elveni, kaj nun estas tiel bone. Vento, folioj, arboj.

— Jes.

— Kaj... kaj akvo! Vidu! Glacio, eĉ l' bordo eĉ glacio!

Ĝia rivereto havis nian vojon. Ŝi ekdaŭris sur la herdo, kaj mi vidis, ke la maljuna tero havas multe da neklarigeblaj sorĉaĵoj! Ne nur knabinojn, eĉ imperiestrojn ĝi iam igas stariĝi mune-piede, kvankam la regatoj poste flustradas, ke ili igis heroj kaj mangiis herbon. Ne, nur ion hudi ili ekdeziris.

Mia infano batadis per pugneto la glacian kaj volis trinki.

— Ne, ne, — mi diris, — vi tro varmigiĝis.

— Jes, verŝajne. Ni devus iam ripozii.

— Ĉi tie neble, pro la vento.

Ni flankiris kaj ekidris eĉ l' arbara rando, kie la vento nin ne tuŝis. Mi metis paltoŝuojn ĉirkaŭ ŝiajn koksojn kaj varmigiĝis per mia peza mano. Ŝia kapo ripozis sur miaj genuoj. Unu okulon duonferminte, per la alia ŝi rigardis min ŝtele.

— Jen, kion vi tie faras?

— Mi? Paŝadas. — ŝi ekridis.

— Kion do?

— Vin!

— Nenio estas.

— Estas! — kaj subite ŝi jetvindis la brakojn ĉirkaŭ mian kolon kaj alpremiĝis tutforte. — Estas! estas! estas!

Mi delikate ion malproksimiĝis ŝin kaj kisus sur-ferme.

Do, Tio estis okazinta.

Kaj kiam ni en la krepusko lucaj revenis en la urbon, en la tuncida aero jam lumis lanternoj. Mi akuzpatis ŝin ĝis la hejmo kaj mero iris rekte al mia loĝejo.

Neniam placiis al mi la urbaj lanternoj, sed tiu-vespere ili nebulis en la stratoj kvazaŭ senfina procesio de martirinoj. Diablo, kia kavalkado! Mi rapidis, la okulojn duone ferminte.

La dika pordisto staris ĝuste en la pordo.

— Bonjour, majestato!

— Ah, vi, — kaj li ion flankeniĝis, por ke mi povu eniri.

Jes, mi estis terure laca. Mi triakis varmecon tute kaj tuj enlitiĝis. Sed ankaŭ la teo ne helpis, nokte komenciĝis febro kaj matene mi devis resti en la lito. Evidente mi malvarmumis. Nu, nenio. Mi povis kuŝi. Mi ja bezonis tempoon, por pripensi kaj ektomproni, kio okazas en la mondo. Kaj jen, mi pensis pri tio, ke mi krimas kontraŭ mia infano, superŝatante ĝin — ja kial? — per miaj leteroj. Estis jam vero, ke ĝi skribis iu... iu *Fidelio*. Kaj skribis ion tute alian, eĉ

kion li parolis, kaj esprimis tute aliajn opiniojn, ne ĝojn, kiujn diris lia buŝo. Tio estis malsaga, nepardoninda! Kaj tamen... Ĉiu ja ludas, kiel li sciopovas. Mi ne sciopovis surteriĝi kvarpiede, interparoli kun ŝiajn tra la blua glacio, sed mi sciopovis ion alian: skribi kaj kontari min mem. Kaj mi devas konfesi — en tio estis multe da dolĉeco! multe da dolĉeco! Sed — prenu la diablo! — tio tamen estis tre maldeca kontraŭ nian intencon. Kaj mi decidis malĉovi al ŝi ĉion eĉ la unu rorkontigo, por ke ni almenaŭ dum unu horo povu esti ĝajaj!

La kusado ekdaŭris, kaj mi igis maltrankvila. Tiofoje mi eĉ ekpensis, ke eble ankaŭ ŝi devis enlitiĝi. Jen, kaj estas la autunaj ventoj! La autunaj ventoj!

Kiam en la tria tago la mastrino anoncis, ke nun deziras renkonti fraŭlino, pro la ĝojo eĉ respondon mi ne trovis. La bona, amata estaĵo — mi pensis, — ŝi estas ĉi tie! ĉi tie! Kiel ŝi senis alveni? Nu jen, ŝi scias!

— La fraŭlino petas, ĉu ŝi rajtas veni.

— Jes, jes, kompreneble, — mi rekonsciigis.

Kaj post momento mi jam audis tra la mura aliaj, atablan voĉon:

— Ĉu vi jam kovris vin?

— Bonvole, bonvole, — kaj mi iris la litkovraĵon eĉ sur la kapon.

Mi audis, kiel ŝi envenis, haltas en la sojlo kaj kontuziĝas, ne kuragas veni pli proksimeon. Al mi ja bone, mi kuzas, sed ŝi staras. Nu jen, amiketo, kom kovraĵo oni ne ŝercu!

Vi ja safokiĝos! — ŝi ekridis: — kiel malbona vi estas!

Jes, vere, mi estis malbona; mi forŝovis la kovraĵon de l' vizago. Ŝi tuj alkaris.

Neniam ankoraŭ ŝi ŝajnis al mi tiel belega, je Dio! Tiel senafekte ŝi diris, ke ŝi konjektis, preskaŭ scias, ke mi malsanas. Al mi placiis ŝia singenero kaj tio, ke ŝi eĉ unu ĝemeton ne elspiris pro mia malsano. La ovara mastrino faris sion ĉinvo-te, — laŭ tio oni povis vidi, kiel malmultekosta varo estas la kompato.

— Nu, kion faras via mangotablo?

— Ĝojas, ke nun eblas verŝi la telecojn pli pluanj.

— Kompreneble, ankaŭ vi?

— Kompreneble, ankaŭ mi.

— Nu jen: ankaŭ vi estas malbenkora.

— Tiaj ni arabaŭ estas.

La lastan tagon ŝi diris tute atrenga, por kvazaŭ fori, preskaŭ serioza voĉo, Ĉe la adiaŭo mi kisus ŝian manon. Apenaŭ fermita la pordo, mio kaptis furiozon kontraŭ mi mem, kaj mi jete turvigiĝis sur alian flankon. Diablon, se ŝi almenaŭ estus vidinta mian skrib-karakteron, se ŝi rigardus al la tablo! Sed ŝi vidis sole min, kaj mi — mi eĉ vorton ne povis diri. Eĉ ne vorton pri la malsagaĵoj, kiujn faras mie *alter ego*, la granda anonima filozofa. La lipoj kompreniĝis, kiam mi volis pri tio ekparoli. Kaj ĉio restis kiel antaŭe, kaj — mi ne scias kial.

La sekvan tagon mi eliris kaj ricevis de ŝi du leterojn. Tio estis dolora, sed kion do alian mi povis atendi? Ŝi ja devis respondi la entuziasmajn sendaĵojn, kiujn skribis iu kompatinda junaŭlo. Haha, dankon al Dio, ke mi almenaŭ konis sian ulon!

Sed en la leteroj estis ankaŭ io pli, ol atendite — tio, ke la lasta estis skribita ĵus — hieraŭ vespere. Jes! La atinda infano sidis eĉ mi, sidis sur mia ŝofo, kaj tuj post furiozo denove ekidris, por ekparoli kun ŝi alia! *Fidelio*, mi anavas vin! Ĉio nekonsata allogas



Jacob van  
Ruisdael

*Alvomuelilo*

kaj ŝajnas glora — jen via nekontestb'a avantaĝo. Sed mi malbenas vin, satano, por ne riproĉi ŝin.

Mi penis pravigi la virinon — efektive, kial ŝi estu submetata al tia ekzameno? Sed vane. En mia interno mi estis tre malkontenta. Mia egoismo asertis, ke mi povas kaj kapablas forpreni de virino la mondon, por anstataŭi ĉion sole per mi.

Kaj la plej stranga en tiuj meditadoj estis tio, ke al mi mem mi riproĉis plu nenion.

Kaj subite, kvazaŭ ventmuelilo komencis turniĝi en mi kaj ĉirkaŭ mi. Ĉio blekegis kaj tondris, kaj la flugiloj sibilante frapigadis.

Mi ekkuis en liron.

Jen, tiel estas. Tiel estas. Kaj nenion oni povas fari, kara amiko. Al ŝi tiel plaĉas, kaj oni povas fari nenion. Nenion, nenion! nenion, nenion!

Por momento mian muelejon haltigis la mastriro, enportante teon. Sed tiam ĝi denove ekmuĝis, furioze kaj frakase. En ĝi pereis ĉio plej bona, kio ŝajnis en tiuj tagoj akirita. Kaj tiel daŭris ĝis noktmezo, kiam mi fine ekdormis.

Sed mateno estas mateno! Mi ankoraŭfoje tralegis la leterojn kaj konstatis, ke la stilo estas senripoĉa. Tuj mi altabligis por respondi, kaj solene atestis, ke mi restos ŝia adoranto dum la tuta vivo. Mi turnigis incenson, ĝis certe devis kapo turniĝi. Tio signifis, ke vojon returne mi plu ne havas. Tion ĝi signifis.

Sed ŝi — kiel gaja ŝi estis en tiuj tagoj! En ĉion, en ĉion hazarde ĝi enverŝis sian kormildecon, kaj kvazaŭ sorĉe belajn kalikojn prezentis al mi. Kaj mi akceptis ĉin kaj trinkis — ĝis ebrigo. Kaj la muelilo denove ekbruis, la radoj turniĝis — ilin movis ja dolorplena, monstra demono. Li hurlis kun la sibilantaj radoj, kaj subite mi rekonis mian propran voĉon: tie rikantis la antaŭa ĥirurgo, kiu ne toleris la homojn, kiu aternis ĉion sur la marmortablon! Iu malbeninda

anatomo, kies mondo — la kadavrejo, kies sceptro la kliniko! Ha, vi maljuna kanajlo! kie vi estis la tutan temp-on?

He, kie li estis? Kompreneble, kie ĉiam.

Ĉar kion do atestis la hezitado, la sendecidemo, la manko de kurajo kaj sincereco? La leteroj kaj la afekta Fidelio? Nun mi komprenas!

Kaj jen — kvazaŭ mordita de falĉilo, mi ekŝanceligis kaj falis teren. Kiam proksimiĝis mia infano, mi deziris krii: ne venu! ne venu! Sed — ĉu mi plu povis tion? Ŝi venadis kiel antaŭe, igante min nepriskribeble feliĉa. Jam mi kredis, ke ĝi estas amo! Nun mi sciis: tio estis ĝuo pro la baraktanta viktimo. Anstataŭ kadavroj mi sentis vivan homon!

Mi farigis kruela. Mi sieĝis ŝin de ĉiuj flankoj. Se tage mi surgenue kuŝis antaŭ ŝi, vespere ŝi ricevis leteron de homo, levanta kapon en superhoma malhumilo kaj fiero. Mi bruligis ŝin per inkviziciaj flamoj, mi tranĉadis, mi disŝiradis la junan karnon. Sed apenaŭ mi rimarkis, ke ŝi tro proksimiĝas al mi, mi admonis: Fidelio! estimata sinjoro! Klopodu, ke viaj leteroj estu brilaj! Kaj mi ne devis longe atendi — ŝi malsekrenigis kaj en malespera embaraso tordadis la manojn.

— Kio estas al vi? — mi demandis estime kaj milde.

— Nenio, nenio.

— Kaj tamen... — mi insistis, karesante ŝian hararon.

— Estas tiel, kvazaŭ mia forto min forlasus.

— Jam? Pro kio?

— Mi mem ne scias. Sed ŝajnas al mi iufoje, ke vi plu ne amas min, kiel antaŭe.

— Jes, vere. Mi amas vin nun multe pli.

— Ŝi kapskuis, dolore ekridis.

— Ho, kion vi!... Sed eble vi akompanos min morgaŭ al opero? Mi tie jam longe ne estis.

— Akompani? Eĉ ĝis la fino de l' mondo!

Ni interkonsentis pri tio kaj disigis.

Iom neĝetis. Survoje mi aĉetis biletojn. Neg-blankigita kiel aciura vosto mi fine revenis hejmen.

Jes, jes! Eĉ ĝis la fino de l' mondo! Tion mi povis promesi, ĉar la mondo ja estas la sola aĵo, kiu havas nek finon, nek randojn. Morgaŭ? Bone, infano mia, ni iros. Mi estos kun vi, mi rigardos vin pli, ol la primadonon. Mi amas vin, mi volas doni al vi ĉion, doni pli, ol vi kapablos akcepti. Fidelio! nia komuna amiko! Vi ja restos al mi fidela ankaŭ estonte?

Kaj jen, ĉi tiu sentaŭgulo skribis sian lastan leteron.

— Mia bona, mia noblanima! La riproĉojn mi akceptas kun klinita kapo. Mi sentas, ke plu ne ekzistas preteksto, por rifuzi vian deziron min vidi. Morgaŭ je la 8-a vespere mi legos gazeton ĉe la plej luma lanterno de l' urbo. Ĝi brulas ĉe la orfejo, sur la angulo. Venu tiujn kelkajn paŝojn, mi vin atendas. Mi atendos vin eĉ malgraŭ tio, ke vi lacigis, promenante kun la studento S. Mi konas tiun sinjoron kaj bedaŭras, ke mi ne estas lia amiko. Tiukaze mi povus pri li multon rakonti. Via Fidelio.

La letero estis zorge enkovertigita kaj forsendita jam frumatene.

Ĉe la tagmango ŝi estis ekscitita. Al mi ŝajnis, ke nur pene ŝi englutis kelkajn kuleronjn da supo.

— Kiel malsage, — ŝi diris elirante, — mi deziris esti hodiaŭ vespere en la opero, sed, verŝajne, tio ne eblos. Mi ne estas tute sana.

Mi kompateme ekprenis ŝian manon.

— Amiketo, mi ja ankaŭ iom komprenas la medicinon. Permesu kalkuli pulson.

Ŝi ridante retiris la manon kaj nomis centon da neprokrasteblaj farotaĵoj.

— Bagateloj! — mi daŭrigis jam ne tiom afable. — Vi farigas kaprica. Tio al mi ne plaĉas.

— Ho, Dio! ja komprenu, kion mi diras!

Kaj mi respondis, ke mi komprenas, ke mi tre bone komprenas, sed al mi ne estas egale, kiel ŝi kondutas. Mi eĉ aldonis, ke tian spitemon mi ne toleros. Kiam ni venis en la parkon, mi eldiris dubon: ĉu ŝi eble intencas provekzameni mian amon? Honto!

— Sciu, — mi ekkriis, haltinte antaŭ ŝi kaj piedbatante la teron: — hodiaŭ vespere vi venos kun mi! Vidu, jen la biletoj! Vi venos, aŭ! . . .

Ŝi lime retirigis.

— Kion ĝi signifas? Mi ja ne estas hundo, ke vi tiel kun mi parolas!

Ŝi kaŝis la vizagon en la manojn, mem konsternita pro sia respondo. Sed nur por momento. Tiam ŝi transiris al flustro, supersutis min per akraj riproĉoj. Ŝi akuzis, kaj ŝiaj vortoj estis nura vero. Mi aŭdis ĉion pri mi, pri mia naneco, mia tiranemo, pri homo, kiu vivas nur de hazardoj kaj . . .

— Silentu! — mi interrompis, — vi ja amis min!

— Jes! eble eĉ nun ankoraŭ . . . eĉ morgaŭ. Sed mi sentas, ke mi ne eltenos, ke mi devas fuĝi . . . fuĝi . . .

— Fugu! — mi siblis tra dentoj, rikane ridante. — Fugu! fuĝu! ja kien?!

La lastaj vortoj, ŝajne, estis decidaj. Ŝi premis per pugnoj la vangojn kaj, malrapide sin turnante, paŝis al la parkeliro. Postdorse laŭtigis paroloj, kaj, ekridante, iris ankaŭ mi.

Jam krepuskis, kiam mi eniris restoracion kaj altbligis en la plej fora angulo.



Jan Toorop

Apostolo Paulo

— Glason da brando!

Mi trinkis, sed ne ebruiĝis.

Venis ĉiam pli da gastoj. Sed estis jam post la sepa, mi devis iri.

Degelis, gutoj faladis de tegmentoj. En la proksima preĝejo oni preĝis ĉe mortinto. Tra la malfermita pordo fajris la kandelingoj, pensigante pri tri-pintaj, flamaĵ forkegoj. Efektive, ili estis la samaj, per kiuj oni en la infero pikadas la kompatindajn pekulojn.

Mi aĉetis gazeton kaj iris al la urbdomo. Ĉe la orfejo kverelis du buldogoj; kiam ili finis, mi transiris la straton kaj apogiĝis al la lanterna stango. Estis lume kaj komforte. Mi elpostigis la gazeton kaj komencis legi. Tie estis presite, ke hundoj efektive tro multigis kaj genadas eĉ la pasantojn. Jes, kiel rapida kaj ĝusta informo! — mi ekmiris, trankvile daŭrigante la legadon. Jus mi finis pri la raboj en komunumo Ormani kaj transiris al banditoj en Lielmeiri, kiam mi devis ĉesigi la legadon. Sur la strato aperis mia infano kaj hezitaŭse proksimiĝis al la orfodomo. Mi disetendis la gazeton iom antaŭ la vizago, ekstaris firme kaj restis senmova, ĝuste tiel, kiel devus iam stari mia monumento.

Siaj paŝoj igis ĉiam pli hezitaj, tamen fine ŝi estis jam tute proksime.

— Venu ja pli rapide! — mi diris, kunfaldante la gazeton, — al mi jam tedis atendi!

Ŝi rigidigis dumpaŝe. Ekkriis subite, kvazaŭ in puŝus ponardon en sian dorson. Mi eĉ ne sukcesis ŝanĝi la pozon, kiam ŝi ekkuris, kun brakoj antaŭe etenditaj. Ŝi fuĝis, puŝfalis, leviĝis, ree kuregis, ĝis ŝi malaperis en la fume nuba mallumo.

Al mi ŝajnas, ke el la mallumo ankoraŭ eliris kelkaj krioj, sed ili estis apenaŭ aŭdeblaj.

Kiam nenio plu estis rimarkebla, mi iris hejmen.

Sufiĉe longa tempo jam pasis de post tio vintro. Mi finis la studadon, estadis en eksterlandoj, sed similaj okazaĵoj neniam plu ripetigis. Por vivsekco plej bone tategas kotajoj, kaj mi transkuras ilin, la homojn plu ne atentante.

El la latva: N. Kurrens.



# NORDKABO

— Dr Marcell Jankovics —

Longfellow, la lasta idealisto de Ameriko, havis belegan romancon, kiu li dediĉis al la trovinto de l' Nordkabo: (The discoverer of the North Cape, — a leaf from King Alfred's Orosius. = La trovinto de la Norda-promontoro, paĝo el la kroniko Orosius de reĝo Alfred.)

Alfred, la estro de la anglosaksoj, kiu estas amiko de l' vero, tenas sur siaj genoj la grandan libron, en kiu li notas ĉion, kion li aŭdas pri la nekonsata nordo. Alrapidas antaŭ lin Othere, la maljuna maristokapitano, en kies pajloflavajn buklojn ŝpinigis jam argentaj fadecoj, sed kies okuloj estas brilaj kaj viglaj, kiel de bonhumora knabo, — ĉar ili rigardas malproksimen. Kaj Othere fabelas pri la malproksima nordo. Li estis tie, kie antaŭ li ankoraŭ neniu. Tie, kie la tago fariĝas pli kaj pli longa, ĝis estiĝas unusola tago, dum kies noktomeza fantoma horo ankaŭ brilas la saugroga stelo:

The days grew longer and longer,  
Till they became as one,  
And northward through the haze  
I saw the sullen blaze  
Of the red midnight sun.

La reĝo aŭskultas atentegite kaj li notas precize ĉion. En tiu ĉi roĝa brulado aperas subite fantomo. Granda ŝtonbalafrapilo, kin eklatas en la taŭmanta maron. La Norda Promontoro:

And then arose before me,  
Upon the water's edge,  
The huge and haggard shape  
Of the unknown North Cape,  
Whose form is like a wedge...

La maro ŝtormas. Falas la praĵno, haflas. La nebulo kvazaŭ griza fantomo priploras la malaperantajn bordojn, sed Othere penetras kaj penetras plus.

La plumo de la reĝo krakatas, de vorto al vorto li skribas la rakonton de la maljuna maristo, sed nekredeme li balancas sian kapon. La alio ridetas. Li provas la verecon de la diritaĵoj. En sia subkonigita mano li kaŝas ion neĝblankan. Li transdonas al Alfred la Granda la rosmardentegon, kiu atestas, ke li estis tie, kie homo ankoraŭ nomiam...

Preskaŭ la tuta romano estas vero.

Alfred la Granda (849—899), la glora reĝo de la anglosaksoj, ne nur la glavan svingis heros, ne nur logojn skribis saĝe, sed li volis ankaŭ scii ĉion, kion homo povas ekscii. Kiel unu el la plej grandaj scienculoj de sia epoko, li kolektis ĉion, kion rakontis vidatestantoj pri nordo. Li estis la unua Marcellus kaj kronikisto de l' pohana esploro.

En la jaro 860-a okazis, ke Othere, la normana maristo, volis esplori, ĝis kie etendiĝas Norvegio. Li tirkabŝipis la Nordan Promontoron ĝis la Blanka Maro kaj pri siaj spertoj li raportis al la plej inda scienulo, reĝo Alfred.

Kiajn animskanĝajn travivaĵojn devis sperti tio koraga viro, kiu sur eta velŝipo kun kvin knuloj («six nor-mannes») ekŝipvojaĝis al la neakademiziata Nekonsato kaj unua li ekvidis la veran taŭmantaŭpalpeblan finon de la mondo, la Nordan Promontoron, li estis la unua, kiu sportis, ke la suno falas nur ĝis la horizonto, sed de tio nevidobla mano denove relevas ĝin sur sian ruĝan lumvojon... Vane li turnis dudekkvarfoje la sabloborlogon sur la busprito de l' ŝipo, ne fariĝis plu nokto. Eĉ post mil jaroj ni povas aŭdi Othere-n pro tia ĉi travivaĵo, ke

unue li ekvidis la «finon» de la mondo, — ke li travivis unue la senmektan tagon.

Kiu havis la bontacon stari dum la minutoj de somera noktomezo supre sur la Nordkabo, tiu povas ligi inter siajn memorojn tian sentoperlon, kiu agordos lin je profunda pietismo kaj dankemo ankaŭ dum lia malfrua maljuneco, kiam ni palpataj jam nur la memorojn, kiel la unuformajn erojn de l' rozario. Sed, se la fingroj de nia animo ektuas tiun ĉi memorperlon, ni ektramelas — kaj denove ni travivos malproksimiĝintaĵojn, sed neforgesitajn belajojn.

Mi staris sur centoj da altegaj montsuproj: sur rokoj, kiuj aŭdace fendas la lazuron, sur la italaj *campaine*, sur la blindigaj neĝo-calotte-oj, de kiuj mi povis nombri la suprojn de l' Alpoj, sur la rutegmentajn urbojn de Lombardio... Ĉia montopinto estis unu diservo de mia vivo, sed eble nenie mi tiom sentis la malproksimiĝon de la materialista mondo, kaj nenie mi povis saluti tiel proksime la triumfon de l' idealismo, kiel sur la supro de l' Nordkabo. Tiu flavroĝa firmamento, tiu senfina maro, trans kiu ne ekzistas homoj kun sopiroj vagantaj en polvo, nun la roko, en sia orfecco, solece rigardanta kontraŭ la vanaj koleroj de l' tempestroj: ĝi estas nio la idealismo...

## Renkontiĝo

— EMBA —

Ondiĝis grenkampo sentina, mara  
ĉe rand' arbora.  
Ŝirigis nebulo de l' herba valo,  
La sunon matenan solutis psaltes  
la najtingalo,  
Lultenis nin lebre en sia sino  
La kampa muziko. Ĉu vi memoras  
ho, amikino?

Odoris la floroj pampantaj, najaj  
ni estis gajaj.  
Ni kaptis la nunon sen celoj, plouoj,  
Karesis nin ventoj varmetaj, vagaj  
per molaj manoj.  
Sekretojn fabelis al ni tilioj,  
Bidante ni kuris en ros' argenta  
post papilioj.

Ho, tiam ja majo sunbrila estis  
ni gojon festis.  
L' ozono de majo dum pasis horoj  
Amgermojn infane naivaj plantis  
en niaj koroj.  
Vespere eksonis safista fluto  
Kaj gardis nin milde la songangelo  
dum nokta marto.

Rigardu!... nun estas denove majo,  
sed kon malgajo.  
Nun ŝargas nin vivo kaj urbo zumas,  
Sed nian malgojon memoroj belaj  
je ĝoj parumas.  
Post dekoj da jaroj!... Ĉu vi memoras?  
Ni ludis ja kome... sed ho!... Nu diru  
vi kial ploras?

El aperanta poemaro.

# Herooj de l' Homaro

— George Verda —

Ne per teruraj sangaj bataloj ili glorigis. Ne estas landoj dezertigitaj, nek popoloj dekonigitaj kaj buĉitaj, kiuj eternigis iliajn nomojn. Ilia heroeo estas la plej alta esprimo de l' vivo, de tiu vivo, kiun ni celas kaj aspiras, kiun ni vartas en niaj koroj kiel plej dolĉan revon. En la funebra kaoso de l' nunaj tagoj, kiam ni preskaŭ perdis jam ĉian kredon pri vera homa grandeco, kiam ni por ni mem sentas sole malsaton kaj malfestimon, la gloraĵoj de Slepnovoj, Kamanin-oj, Molokov-oj, Uŝakov-oj kaj iliaj kolegoj elstaras kiel flamantaj torĉoj kaj brilas kun blindiga lumo, heligante niajn mornajn animojn kaj versante freŝan fidon en niajn korojn.

La ekspedicio de »Celuskin« kaj la elsavo de ĝia anaro deper bravuloj, kiuj malkaŝis ne nur eksterordinaran kuragon, sed — antaŭ ĉio — profundan instinkton de homa respondeco kaj solidareco, estas sendube la plej bela, la plej poezia ĉapitro en la historio de nia gangrenumita periodo. Ĝi estas potenca antaŭensvingigo de l' homa spirito kaj plenigas nin per ne-esprimebla ĝojo — ĝojo ne sole pro tio, ke la malfeliĉaj ŝiprompuloj estas savitaj, sed ankaŭ pro tio — kaj tio por la estonteco estas la plej grava — ke la tuta helpagado da tiam minacaj danĝeroj estis konsiderata kiel afero de nacia honoro kaj prestiĝo.

Kun retenita spiro ni sidadis ĉiutage ĉe la radio-aparatoj aŭ sekvis avide la gazetraportojn pri la sorto de l' malfeliĉuloj, kaj ĉiufoje kiam ni sciigis, ke tiu aŭ alia aviadisto entreprenas la savoprovon, elmetante sin mem al plej granda risko, ni ekscititaj kaj emociitaj, benis la nekonatan heroon, plej sincere dezirante al li sukceson en lia batalo kontraŭ la kruelaĵoj de l' naturo. Disigis nin dekmiloj malsamaj, kontrastaj konvinkoj — sed spirite ni kunfandigis kun ili. Kaj se iu el ni inklinas al mistiko, li rajtas kredi, ke ne sole la gloraĵoj herooj savis la ŝiprompulojn, sed ni mem ankaŭ, ni ĉiuj, kiuj, vere, korpe ne partopre-

Laŭ tri ĉieldirektoj ne ekzistas eĉ la plej malgranda terpeco, kiun povus homo nomi sia hejmo. Oriente kaj okcidente vere ne ekzistas, sur tiu ĉi granda ringo ĉie ĉiĉkaŭe regas la virgepura senhoma soleco. Norde, se ni ne konsideras la malproksiman okcidentan *Aalesund* apud la bordoj de l' fjordo *Kingsbay* de l' Spitzbergen, nur sur la transa flanko de la terglobo, trans la poluso — en Alasko (Kanado) vivas homo. Kie troviĝas sur la vasta terglobo ankoraŭ tia loko? Kie?

Kiam nia ŝipo proksimiĝas de la direkto de l' insulo Ursoj al Norvegujo, dum horoj ni vidas antaŭ ni la flavajn, nebulkovritajn, sunlumigitajn rokojn, la fatamorganon de la malproksima kontinento. Ni revidas iun, kiun malgraŭ ĝiaj multaj mankoj tamen neprikribeble ni ŝatas. Ni revidas — Eŭropon, kaj ni tre amas ĝin.

Kalvaj, dezertaj rokoj leviĝas antaŭ ni. Nenia vegetaĵo, nur birdoj vivas sur ili. Ie la pafsonoĵo de la ŝipkanono salutespondas miriade da birdoj per laŭta pepado kaj flugilfraspado. Iliaj svarmoj mallumigas la ĉielon. Ni kurbdirektigas al nordoriento — kaj sub latitudo 71° 10' 54" jen altas antaŭ ni la fiera promontoro de la insulo Magerö, la 307 m. alta Nordkabo. Ĝi estas alta, perpendikla, malhelega, apitema — ignore ĝi rigardas malsupren al la ondfrapanta, ekscitita maro. Sur ĝia supro videbliĝas eta domo kaj la siluetoj de kelkaj

nis en la savado mem, sed kiuj en ĉiu parto de l' mondo, en ĉiu terangulo — ĉiu laŭ sia maniero — sentis sin kunaj kun tiuj herooj. Tiu-ĉi konscio inspiras al ni ian noblan fieron kaj aternas paradizan spaliron inter dornoj kaj urtikoj sur la mizera vojo de nia nuna vivo.

Pri tio ja temas: ke guste nun, en tempo de cinika egoismo, kiam la ideo de homeco kaj solidareco refalis en foran antikvecon, kelko da bravuloj previs al ni, ke ni eraras, ke la homa animo tute ne falis ankoraŭ tiom malalten — ili larigis vivanta universitato de bela optimismo, kaj kiel longe ekzistos sur nia tero Kamanin-oj kaj Uŝakov-oj kaj Schmidt-oj, tiel longe ni firme alte tenos la standardon de homeco, de solidareco kaj nobla idealismo!

La senmombraj Aleksandroj, Cezaroj kaj Napoleonoj perdas sian majestatan brilon, kaj ilian lokon en la historio ekokupas reĝoj de l' scienco kaj homa nobleco, kiuj ofte staris ĝis nun en angulo de l' forgeso kaj ignoro. Dekgroŝa retorto de fanatika mikroĉasisto kapablas mortigi miloble pli da niaj malmalnikoj ol la vanteco de niaj napoleonoj. La braveco de l' rusaj aviadistoj estas nekomparebla kaj ĝin pruvos neniu el la nunaj »popolsavantoj«. Felicia estas la generacio, kiu scios respekti kaj ami *tiun* heroecon.

La sovellanda registaro kreis specialan ordenon, nomante la bravajn aviadistojn »herooj de Sovetio«. Kun nobla egoismo ni direktas nian proteston al Sovetio: ne nur la viaĵo estas tiuj-ĉi herooj. Ankaŭ ni, kiuj spirite sekvis ilian danĝeran vojon, ankaŭ ni volas havi la honoron jubili al tiuj herooj Slepnovoj, Kamanin, Molokov, Uŝakov, Smidt kaj ĉiuj aliaj, kiuj ferrabis de l' Blanka Morto ĝiajn viktimojn kaj redonis ilin al la vivo, ili ĉiuj estas ankaŭ niaj herooj. Ne nur »herooj de Sovetio«, sed »Herooj de l' Mondo«, »Herooj de l' Homaro« — kaj al tiuj-ĉi senmortalaj herooj ni jubilas hodiaŭ kaj aklamas: Hura! Ili vivu!

homoj. Nin oni atendas: la poŝtisto, kiu scias, ke nun kelkiloj da ilustritaj poŝtkartoj dismigros de ĉi tie al ĉiu direkto de la ventkompaso, — kaj la plej norda kelportisto, kiu hodiaŭ tie supre kalkulas je l' malplenigo de kelkaj boteloj da senmalutilaj, prohibiciaj trinkaĵoj. Ambaŭ ili konas la homan erarecon. Kiuj en sia vivo nur foje povas stari dum sunlumigita nokto sur la plej norda promontoro de Eŭropo, tiuj tie supre skribas ilustritajn poŝtkartojn kaj pro ĝojo pri sia granda travivaĵo ili intertintigas la glazojn plenigitajn per senalkohola ĉampanaĉo, anstataŭ enprofundigi sian animon en la senlimecon, por ke ilia animo ricevu tom da fajrorezista ornaĵo kontraŭ la purgatorio de l' vivo.

Ni havas feliĉan. La vespero estas silenta, la oceano kvieti. Se ankaŭ neze de somero furiozas ĉi tie la neĝventego, tiam oni neniel povas alproksimiĝi al Nordkabo. Sur la senindulgaj rokoj disrompiĝas eĉ la plej forta boato, kvazaŭ malplena glaso jeta de senbride dancanta ebrulo kontraŭ la maron. Kiam la elementoj dibobas, la humoro estas ĉi tie tre sovaĝa...

Kviete ni tarmiĝas malantaŭ la Kabon en la malgrandan Hornvik-golfon.

Kelkloke deklivaj, herbokovritaj montetoj estas videlaj. Ankaŭ ili estas loĝejoj — sub la tero, ilia enirejo rigardas al la monto. Intense tre hejmeca estas tiuj ĉi subteraj kaŝigitaj hejmoj, povas furiozi super ili la

# El „La Trofeoj“ de J. M. Heredia

— G. Waringhien —

## Al triumfinto

*Imperator grandfamo, sur via ark' ilastre  
skulptigu militistojn barbarajn, kont-angorojn  
de l' estroj sub la jugo, armarojn, ŝpdekorojn,  
et la kaptaĵo mara la restema kaj aplastre.*

*Cu Aeneas-fil' vi estas, ĉu Isonpulid', inkruste  
nà ĉie skriba nomojn, titolojn kaj honorajn  
en la barelinojn kaj en la friz-marmorojn,  
profunde, ke l' juturo ne ŝtelu via maljuste.*

*L' arcilon foton ŝvingos la Tompa jano. Ĉu do vi  
esperus olan famon truu la jarcentajn lavi?  
Aĉe heder' sufiĉas por brevo de trofe'.*

*Kaj sur triumfaj ŝtonoj falintaj, kie briton  
de via glori ruina la herbo kaŝas, ve,  
sola karnpal' sanvita brebetos la fakilon.*

## La kuranto

*Kia lin vidis Delfoj, ĉarmanta pleban guston,  
fluganta tra l' stadio, dum Thymos lin kun cedo  
postrestis: jen per svelta, ventflaga bronziĉelo  
Ladas ankoraŭ tretas sian marmoran juston.*

*Beateŝtreĉe, fiksokole li antaŭlelinas buston,  
de l' frunto bronze perlas guteto post guteto,  
et la mullilo, tajnas, elvolis la atleto,  
dum la skulptisto fandiĝis lian vivantan bruston.*

*Là pelus, li tramogas de febra kaj espero,  
la flank' anhelas, mankas al lipoj la aĉro,  
pro fortostreĉ reliefas muskoloj el metalo:*

*L' impet' neczistebla de lia kur' lin pelus,  
kaj pubeante preter la propra piedestalo,  
li por la glori palmo en la arenon celus.*

## Epitafio

*Jen kutas, ho Fremdulo, la verda salt-lakustio,  
de Helle dusezone vartita levoza ide,  
kies flugil', vibranta sub dentaj ŝeruraj strido,  
brundis en la pino, citizo kaj ligustro.*

*Ve, de ĉi lir' natura mutigis jam la flustro,  
ĝi, Muz' de l' kampoj, sulkoj kaj greno — jen rigide,  
Por ĝin en dorm' ŝaĉla ne ĝeni, ho rapide  
pasu amik', ne pezu sur ĝia eta brusto.*

*Rigardu: en la mezo de timiano blankas  
ĝia funebra ŝtono metita nar freddate,  
Ho, tia sori' konsola ol kiom homoj mankas!*

*La tombo per la larmoj kuŝbitaj privekate,  
ol la Aŭroro pia ĉian matenon dankas  
oferon da rosgutoj faritan delikate.*

uzagano de Apokalipso. — La mastro ne atentis pri la kolero de l' vetero.

Ni albridiĝas. Ne malproksime ŝrampiginta Iapono skulptadas cervobranĉkornon. Norvegaj infanoj koradas tien kaj reen kaj proponas kolorajn bastonojn. Bona, sigzage kurba vojo kondukas supren, kiu dum kelkaj minutoj pleniĝas per la pilgrimantoj de l' Belo. Estas ĉirkaŭ la deka vespere, tamen ni rimarkas nur tiom, ke ni iras en orbeo, en la propra ombro de l' Nordkabo. Post tri horokvaronoj ni atingas la altanon de l' monto-supro, de kie keplumita, dratkondukile direktita senvoja vojo kondukas al la rando de l' Nordkabo. Dum 20 minutoj oni devas iri laŭ tiu ĉi dratsignilo: en neĝo, nebulo, nur tiu ĉi Ariadne-fadeno montras la ĝustan direkton. Supre freŝe salutas nin la vintreca, sala spiro de l' maro kaj la milda rideto de l' ruĝo suno. La mirbela, ni povus diri malgaje rezignacia noktomeza suno. Kiam enprofundiginte ni rigardas tiun ĉi ruĝan stelon, ĉe la rando de l' Atlantiko, volvitaj en tien kaj reen solstantajn viol-kolorajn nubojn, senvole ni devas pensi pri helulino sin kuŝanta malantaŭ vidvina vualo. La beleco de la suno estas perfekta ankaŭ noktomeze, sed ĝi brilas al ni de-tualantaŭ vidvina vualo; intere estas ia granda malĝojo.

Mia ĉirkaŭas rokpinetoj, kalvaĵoj. Ĝi ne plu estas la regno de l' homo, sed de la fiulo. Poste la oceano, la lazura, argenteca, oestria oceano. Kiu ne staris ĉi supre, ne povas scii, kion signifas tiu ĉi vorto: maro, kiu estas ligita kun la penso de senfino.

Ni rigardsekvas la fajrokolonon tra la undoj, de la

sunbulo ek kaj ekflamanta ĉe la horizonto ĝis la balano-iganta Orinoco. La granda blanka ŝipo tajnas de ĉimpre nur infanulido. Mi povus ĝin teni sur mia manplato. Tial mi ŝatas la altaĵojn, ĉar de ili rigardante ŝio, ĉio estas ludajo, tial la plej granda felieto estas la altaĵo de l' animo, ĉar ankaŭ de tie rigardate ŝio, kio ĉin rigardas granda kaj potenco, estas nur ludajo.

Estis bele...

Kiam tra la monta vojeto mi paŝadis reen, mi sentis, kiom mi ridigis: per netaksebla memoreo. Sed mi ankaŭ sentis, kiom mi malridigis: per plenumiĝinta espero. Jam apartenas al la pasinto io grandioza, kion mi travivis.

Kiam la Orinoco malrapide sin turnas al Okcidento, ĉirkaŭ la unua nokte, denove levigas la suno ekripozinta per kelkaj minutoj. Ĝi kolorigas skarlatroĝe la malproksimigaŭtajn rokojn de l' Nordkabo. En mia animo senĝese aŭnas penso de Ady:

..... Majesto,

Nordkab', mistero, frenda esto.

El la hungara: *Aleksandro Csáder.*

Dro Marcell Jankovics (naskiĝis en 1874.) hungara verkisto en Bratislava. En sia junago li vivis plurajn jarojn en Torino (Italujo), kie mortis ekzilito lia onklo Ludoviko Kossuth (1894). Li estas eminenta alpinisto kaj sur tiu ĉi kampo li atingis gravajn rezultojn. El dekdu da liaj he'ekistaj, plejgrandparte alpinistaj verkoj mi citas: Sur senvojaj vojoj (1903.), Aglonestoj (1906.), La Alpoj (1911.). La iamuloj de l' Nordo (1930.), Kor-tega artefeco, Hungaraj polveroj.

# PRINTEMPO FURIOZAS

(OCUJA KOROŝI)

— JUNIĆIRO TANIZAKI —

Nun, Sinsuke mem ne povis kompreni, kial li mortigis lin, kial li faris tian kruelaĵon. Li ne povis pensi alie, ol ke lin instigis senespera konvinko, ke li povos sin forsavi nur, se li mortigos la viron, kaj li mortigis lin, kvazaŭ en duosonĝo. Aparte de la nervoskno, li sentis en si, malgraŭ kelkaj vundoj doloraj, ankoraŭ la ĉeeston de tiom da spirita forto, ke li miris, »Kiel facile estas mortigi homon!«

Kio okupis lian penson en la sekvanta momento, estis la demando, ĉu li forkuru, aŭ kapitulacu antaŭ la lego. Ĉiukaze, li ne malfruos, li konkludis, se li iros unue por vidi sin kaj poste elektos la vojon motan. La aspekto de la korpo de la viro, povinta ridi, koleri kaj batali ĝis antaŭ momento, nun simpla maso da karno, kuŝanta tie kiel ŝtupo, tiel subite perdis la parolkapablon, — nun ŝajnis al li preskaŭ ridinda. Li tuŝis la korpon per siaj piedpintoj, kaj lia sento de teruro — strange — miksiĝis kun tiu de amuza mokemo. Ial al li ŝajnis, kvazaŭ tio, kion oni nomas homo, estus nur treege interesa meĥanikaĵo elpensita de ekstrema genio. Por eviti provizore la malkovron de sia krimo, li ĵetis la kadavron kaj la batalilon en la riveron, kaj tra la pluvo ankoraŭ forte batanta, li rapidis kure al la hejmo de la boatisto en Takabaŝi.

»Por nia ĉefo mi bezonas vian kapon!« — diris Santa. Do estis facile nun vidi, ke Seĵi estis, je lia miro, granda kanajlo, kaj lia domo devis esti nenio alia ol nesto de kanajloj laborantaj sub la masko de boatisto. Estis facile vidi ankaŭ, ke Seĵi intencis lin mortigi, ĉar li volis forrabi Cuj-a-n. Sed se la tuta domo estas unuiginta en la konspiro, la foresto de Seĵi tute ne signifas, ke li povas tien reveni sen antaŭzorgo. Ĉiukaze, pensis Sinsuke, ne estos tiel facile revidi Cuj-a-n. Ju pli longe li meditis, des pli dolore ĉagrenis lin la penso, ke li tiel facile falis en la kaptilon de la diabla kanajlo; kaj lia ĉagreno plu kreskis, ĝis fine sovaĝa malamo al la boatisto kaj pasio de vengo ekkreis en lia koro.

»Mortigi unu, mortigi du — kia diferenco? Se necese, mi mortbatos tiun hundon. Kaj tuj tie mi mortigos min pro justeco!« En momento de senespero li pensis tiel; tamen, vivi li volis je ĉiu kosto ĝis li revidos sin, amatan sinofere. Kaj kion fari, se li ne povos sin revidi — revidi neniam plu? Antaŭ la malĝojo de tia penso, la pasio kontraŭ la boatisto ŝajnis velki for de lia koro kaj ĝi nun plenigis de dolora sento de mizero kaj soleco, neretenebla kaj neregebla.

Por sin ŝteli en la domon kiel eble plej senbrue, li komencis eviti la piedbruon jam kvar aŭ kvin metrojn de antaŭ la domo. Ĉirkaŭirinte en la mallarga paŝejo flanke de la domo, li metis la oreilon al la kuireja pordo, preskaŭ dezirante aŭdi plorkrion de Cuj-a; sed nenio voĉo interne; ĉiuj ŝajnis nun dormantaj. La vetero neniam povus esti pli favora por tia tasko, kaj li pensis, ke li povas fari iom da bruoj. Li maltime decidis perforte demeti unu el la glitpordoj el la sojlosulko. Sub lia kolektita forto, tamen, tuj cedis la pordo; ĝi eble ne estis riglita, kaj facile glitis flanken. En la interna ĉambro li trovis lanternon ĵetanta malfortan lumon, sed neman signon de antaŭirinta okazaĵo. Tamen, li ne forgesis antaŭzorgi, sin armante per fiŝtrancilo, pendanta apud la defluejo de la kuirejo,

kaj kaŝante ĝin en la sino, ŝtele li iris internen. Kiam apenaŭ li proksimiĝis al la bazo de la ŝtuparo, jen —

»Kiu estas? Ĉu estas vi, Santa?« Estis la edzino de la boatisto, kiu alparolis; ŝia voĉo estis apenaŭ pli ol flustro.

»Jes, estas mi,« respondis Sinsuke per voĉo tre mallaŭta kaj rauka kiel la ŝia, kaj tie li haltis.

»Do, kiel iris la afero — ĉu bone?« ŝi plu demandis en maltrankvila voĉtono. La virino sola sidis apud la fajrujo sin varmigante per piedvarmigilo. Videble ŝi atendis en ĉiu momento la revenon de Santa, eĉ ne povante dormeti. Kaj sufiĉe strange, la dungitoj, kutime dormintaj en la apuda ĉambro, ne troviĝis tie hodiaŭ nokte. Ĉu do Cuj-a estus ien forkondukita; li demandis al ŝi, kaj tio mirigis lin ĝis teruro.

»Estu trankvila, mi ludis la rolon lerte kaj bone,« li diris imitante la voĉon de Santa, kaj maldelikate malfermante la ekranon, li sin montris antaŭ la virino. Daŭre per la same mallaŭta voĉo, sonanta eĉ pli timige pro sia altrudita moltoneco, li diris —

»Diru al mi, kie Cunj-o estas.«

»Ha, Sin-don!« ŝi kriis spasme, sed ne parolis plu. Ŝia miro estis tiel granda, ke ŝi apenaŭ sukcesis ne sveni post granda korstreĉo, dum ŝi blinde serĉis en sia koro ian artifikon por kovri la situacion. La aspekto de Sinsuke, tamen, estis tro plena de morta ekscito por lasi al ŝi tian ŝancon. Li mem ne rimarkis tion, ĝis li trovis sin en la lumo de la lanterno; ne nur liaj vestoj disiritaj, sed ankaŭ lia korpo mem estis makulitaj kelkloke per ŝlimo, pluvo kaj sango, — terura aspekto, ne de surteraj estaĵoj. Momenton Sinsuke konsterniĝis vidante tion, sed li tuj eksciis, ke li nun devas forlasi ian ajn esperon kaŝi la faritan sangverŝon.

»Kio ja okazis al vi, Sin-don?« ŝi demandis ŝajnigante, ke ŝi nenion scias, kiam ŝi sufiĉe retranskiviligis.

»Kial demandi? Mi ĵus mortigis Santa-n! Se vi diros al mi, kie estas Cunj-o, mi ŝparos al vi la vivon.« Li etendis la tranĉilon sub ŝian nazon, kun minacaj voĉo kaj tenigo. La virino restis eĉ provoke trankvila.

»Sendube ŝi estas sur la supra etaĝo,« ŝi diris kaj ekbruligante longan pipon, trankvile ekfumis kun indiferenta mieno.

Ŝi estis antaŭe ĉiesulino en Joŝiŭara, de kie Seĵi prenis sin, post kiam lia unua edzino mortis. Malgraŭ sia kresko iom tro alta, ŝi estis virino kun bela haŭtkoloro kaj treege alloga talio; virino en la trua posttagmezo de sia vivo, ĉirkaŭ tridekdu aŭ tridektri jaroj. Kiel virino kutime fanfaronanta pri siaj firmaj nervoj kaj koro, eĉ superaj al tiuj de viro, ŝi neniam perdis sian aplombon en tia okazo. Estis rekoneble ankaŭ, ke la virino, kutime rigardanta lin de supre, kiel knabinece malfortan graciulon, aŭdis lian konfesion pri murdo kiel pli malpli simplan minacon por ŝin timigi momente; kaj ĝuste pro tio, ŝi laŭeble penis ne montri sian malfortan flankon. Li volis ĉiukaze traserĉi la supran etaĝon, kaj provis ligi siajn manojn kaj piedojn per ŝnuroj por ne doni al ŝi eblon forkuri intertempe.

»Kia impertinento, diablido!« Ŝi sin ĵetis antaŭen por ataki kaj luktovenki la viron, kredante en li neniam



Josef Israëls

Mortangela

da vireco. Sed sub bato donita sur la spinon kun tiel granda forto, ke ĝi preskaŭ sensentigis ŝin, ŝi rulfalis nun senpova antaŭ la viro. Nur unufoja sperto en hommortigo donis mirindan progreson al lia arto lerte fleksi, tordi, puŝi, premi la homan korpon. Estis negranda laboro al Sinsuke ligi la kvar membrojn de la virino kaj ŝtopi ŝian buŝon.

Kun la helpo de lanterno, li supreniris la ŝtuparon. Ĉambroj, kameroj, malantaŭo de la ekranoj: nenio restis ne traserĉata; sed li ne trovis Ĉuja-n. Li jam antaŭe supozis tion, tamen, fine certiginte, ke ŝi estas forrabita, li sentis sin senhelpa kiel infaneto forlasita kaj vojperdinta. Mallumaj pensoj atakis lian koron. Kun vizaĝo tordita de duonploro, li malsuprenkuregis la ŝtuparon kiel frenezulo. Sin alkroĉante al la jam perdigonta espero, li trairis ĉiujn ĉambrojn de la malsupra etaĝo, kaj rigardis eĉ sub la verandon, sed nenie li povis trovi Ĉuja-n.

»Nu, diru! Kie vi kaŝis ŝin? Alie vi perdos la vivon.« Li diris, kaj formetis la ŝtopilon el ŝia buŝo. Kaj dum li demandis, li frapis ŝiajn vangojn per plata flanko de la tranĉilo.

La virino silentis trankvile kun fermitaj okuloj. Baldaŭ ŝi iom malfermis la okulojn kaj akre rigardante lin, ŝi diris:

»Kion povas fari vi, azenulo? Vi mortigos min? — bone, neniu vin malhelpos«. Si ree fermis la okulojn. Ŝi ne plu moviĝis, firme kiel ŝtono. Okaze li rimarkis, ke li ankoraŭ ne serĉis en la ĉambro de la servistinoj, kaj ke estos pli prudente devigi ilin konfesi, ol vane torturi ĉi tiun malmolkoran virinon. Li salte rapidis tien. Kaj tre strange denove, li trovis neniun el la tri servistinoj, kutime dormintaj tie. Ŝajnis, ke oni antaŭe forsendis la domanojn kredeble kun komiso, por ke ili ne baru la vojon de konspiro. Sinsuke revenis do tien, kie li lasis la virinon kaj, el kia kaŭzo? tuj malligis ŝin. Jetante sin antaŭ la virinon, kun kapo mallevita ĝis la planko, li kunmetis la manojn en gesto de publika preĝanto, eĉ ne la maniero kaj humileco de surstrata almozulo.

»Pardonon, mi petas!« li estis fervora. »Mi pentas pro tio, kion mi faris kontraŭ vi. Mi pentas, mi petas vin — vidu, kiel mi petas! Pro via kompatemo, jam ne koleru kontraŭ mi! Havu kompaton — havu koron — nur diru al mi, kie estas mia Ĉunjo! Jen estas ĉio, kion mi volas demandi, — mi petas!«

»Nu, vi devas scii; vi serĉis en la tuta domo. Kial demandi al mi do? — Tio ne estas mia afero.«

»Pro kio nun tiu ŝajnigo? — kiom ĝi utilis? Por mi ne estas malfacile vidi, ke vi ĉiuj unuigis, kaj ien forkondukis mian knabinon. Nu, ĉu vi ne vidas, kiel honesta kaj malkaŝa mi penas esti al vi? Ĉu mi ne diris al vi, ke mi mortigis Santa-n antaŭ ol mi venis ĉi tien? Mi ne diras, ke mi volas trovi la knabinon por fari ion kun ŝi; nek ke mi volas kapti vian edzon por min vengi pro tio, kion li faris kontraŭ mi. Mi nun demandas ĉi tion nur, ĉar mi volas — mi devas — revidi mian Ĉunjon — ankoraŭ unu fojon en mia vivo — por diri al ŝi adiaŭ; ĉar morgaŭ mi donos min en la manojn de la lego. Nu, pensu pri ĉi tio, mi petas. Eĉ se mi havus ion kontraŭ vi, domanoj, certe pri nenio vi povas min juste akuzi. Kaj kiam mi prezentas al vi la lastan peton de mia vivo, kial vi povas ĝin ne plenumi? Plenumu ĝin por mi, kaj mi donos al vi la vorton de viro, ke mi diros neniun por kuntreni vin aŭ vian edzon en malfacilaĵon, tute egale, kiam ajn torturon mi devos suferi en la juĝa korto.«

»Nu, aŭskultu, Sin-don. Mi aŭdis, ke vi babilas jen pri mia unuigo, jen pri kuntreno en malfacilaĵon, kaj pri ĉio ĉi nur vi sola scias. Bone, montru al mi la pruvon de tio, pri kio vi parolas! Eble vi frenezigis pro tio, ke vi mortigis homon. Kion ajn Santa farus, tio ne estas afero de mia edzo. Sengene iru kaj donu vin al la lego, aŭ vengu vin kontraŭ la ĉefo, aŭ faru kiojn ajn vi ŝatas, tute laŭ via plaĉo.«

»Se vi estas tiel senkulpa kaj pura kiel vi asertas, kial vi ne diras al mi, kie ŝi estas? Kaj ĉiukaze, kien iris sinjoro Seiĵi?«

Videble la virino fariĝis pli kuraga. Kun maltima sinteno de insultemo ŝi rigardis lin, kun manoj enŝovitaj en la sinon. Ŝia voĉo portis tranĉe malvarman mokemon, kiam ŝi diris:

»Kien iris mia edzo, vi demandas? — Lastatempe li eliras ĉiunokte; kiel do mi povas scii ĉiunokte, kien li iras! Pri Ĉunjo; ŝi diris, kiam ŝi eliris frue en la vespero, komprenante la servistinojn, ke ŝi iras ĝis Hirokooĵi por vidi spektaklon. Sed vidante, ke ŝi tiel malfruas, eble okazis al ŝi io malbona, mi supozas.«

Dum li aŭskultas la insulton de la virino, lia koro denove prenis teruran turnon. »Hundo! Kion fari kontraŭ la virinaĉo?« li blasfemis en sia korfundo. Se estas certe, ke li jam en povas trovi ian ajn rimedon por

elpremi el ŝia buŝo la voron, kie ŝi estas, li devas prokrasti sin doni al la lego dum monato, aŭ eĉ duonjaro, ĝis li fine retrovos ŝin. Kaj malfacilaĵo, pri kiu li pensis, estis, ĉu lia krimo povus resti ne malkovrita ĝis tiam. Kio ŝajnis certa interalie, tio estis, ke la virino akuzos lin sekrete.

Tia penso disvolvigis en la koro de Sinsuke, dum li tie staris en paŭzo, en malcerteco, kun okuloj fiksitaĵ sur la duonturnita vizaĝo de la virino, kiu sidis sub li, kun fleksitaĵ genuoj, trankvile fumante per ŝia longa pipo, kiel senhontulino kun mieno de supereza memfido.

»Kaj ĉu ŝi ne estas la edzino de tiu viro, Saĝi? Se mi mortigos ŝin rebate pro mia sufero, al mi restos plu nenio danĝera kaj mi povos venĝi la knabinon pro la malbono al ŝi farita. La aspekto de la virino — kun pufaj vangoj, tiel malmala kaj fiera, tiel malbenite certa pri si, neniom sciante pri ŝia vivo jam nun finiĝonta; — humuro! Kaj simpla ekstreĉo de mia brako, simpla ekpremo ĉirkaŭ ŝia kolo — kaj jam restos al ŝi nenio, krom kadavro! Kia amuzo!«

Subite lia koro klinis sin al fantazio eĉ pli terura, eĉ pli diabla. Senvorte li prenis kanabŝnuron ĉe ŝia piedo kaj fulmorapide volvis ĝin ĉirkaŭ la kolo de la virino. Li realigis la fantazion precize, kiel ĝi aperis en lia koro. Kiam tio finiĝis, subite li sentis sin ellacigita, morte laca, — sendube sekvo de la tuta streĉo, kiun li devis elporti. »Mi ja estas granda krimulo.« Ĉe tia penso, la haŭto de liaj propraj manoj kaj piedoj ŝajnis al li plene malpura de nuanco de fantomeca malhelbluo. Eĉ se li volus tuj forkuri, li povas fari nenion kun tiuj ĉi sangomakulitaj vestaĵoj. Li iris al la kuirrejo, kaj nudiginte li lavis la tutan korpon plene maku-litan de sango. Feliĉe, sur la kamerbreto, li trovis plenan vestaĵaron, ŝajne de Seiji, kaj li vestis sin per ili. Ili estis vatita vesto el peza pongeo,\* supervesto el la samo kaj malmola iom larĝa zono kun strioj meze de la brunnigra fono; al li ĝusta kaj konvena kostumo kun gusto de respektinda kvieteco. Due li turnis la atenton al la tirkesto de la komodo, el kiu li prenis miksite ĉirkaŭ tri »rjoo«-jn da oraj kaj argentaj pecoj. Li faris tion unuflanke por plenigi sian propran bezonon en tiu tempo, kaj samtempe por ŝajnigi ĉion kiel sekvon de entrudiĝo de rabisto. La demetitajn vestaĵojn li kunvolvis en paketon kun peza ŝtono uzata por peklo, kaj forsendis ĝin en la profundon de la kanalo. Ĉion ordiginte kun tia antaŭzorgo, li turnis sin al la sceno, kie nun troviĝis nenia atestaĵo montranta lian murdon al Santa kaj al la virino. Aŭ, li penis perforte trankviligi sin pre tia penso.

Ekstere, la pluvo jam antaŭe ĉesis. En la ĉielo plenserena, la meznokta luno brilis froste kaj hele. Li kovris la kapon per profunda ĉapo, kiun li ne forĝesis kunporti. Kaj, ĉe la unua angulo de la pli larĝa strato, li preterpasis la patroldomon nealparolite.

### PARTO III.

En la tagoj, kiam ankoraŭ Sinsuke vivis kun siaĵ gepatroj, lia patro ofte prenis lin al la hejmo de tiu ĉefa de vetludistoj, nomata Kinzoo, kun kiu la patro havis personan rilaton. Estis lia domo, kien Sinsuke, havante neniam alian lokon, devis sin turni en la nokto, kiam li plenumis la teruran krimon.

En ŝia juneco, Kinzoo kondukis sian vivon tute

\* silko ne tre bone ellaborita.

nerogule kaj riproĉinde, tamen, kun la riĉaĵo kreskinta kaj la prudento maturiginta, li komencis tute novan vivon dum la lastaj du-tri jaroj, de kiam li atingis la agon de kvindek jaroj, kaj li nun estis konata kiel homo racia kaj sindetena, tute diferenca de la homo de lia antaŭa profesio; nun li estis homo simpatia kaj grandanima por tiuj, kiuj bezonis lian helpon.

Sinsuke delonge konfidis lin, priskribis al li la konturon de la okazaĵo en tiu nokto kaj petis al li kaŝi lin sub ŝia tegmento dum kelka tempo, promesante, ke li donos sin al la lego, kiam li retrovos Cujā-n. Priskribante la aferon, Sinsuke konfesis pri la morto de Santa, sed ne tuŝis tion, kio koncernis la boatŝtedzinon.

»Sinjoro Sinsuke, se vi bezonas mian helpon, oble vi povos ĝin havi; sed estas io, al mi nevidebla tute klare. Nun vi diris, ke vi rekte venis ĉi tien tuj post la morto de Santa. Kaj mi vidas, ke via korpo estas plena de vandoj, sed la vestaĵoj aspektas tute pure. Mi ne komprenas tion.«

Tuj Kinzoo rimarkis. Trafite Sinsuke tremis de teruro. Kiam li forlasis la domon de Seiji, li pensis, ke li certe lavis sin pura. Nun, atentigite, li trovis koaglitantan sangon ne nur ĉe siaĵ fingrunĝoj kaj ĉirkaŭ la kolo, sed eĉ sur la maldekstra tempio; ĝi gluis tie la harojn en ĉiftufeton. Li do ne povis fari alie ol konfesi ĉion.

»Mi jam supozis tion. Nun mi vidas ĉion klare. Kial do ne plenumi vian peton? Kredeble ni povos labori kune por retrovi la knabinon, de vi nomatan Cujā. Sed antaŭ ol mi faros ion ajn, mi devas vin komprenigi, ke vi nepre vin submetu al la lego tuj, kiam vi retrovos la amatinon. Nu, estis tempo, kiam ankaŭ mi mem mortigis unu aŭ du homojn, sed — unu fojon ekkoninte ĝian senton, jam estas terure malfacile forgesi ĝin por ĉiam. Vi neniam estis tia homo, kiun mi povas nomi malmulo, sed nun vi estas tute alia. Jam estas nenio, kio povas vin haltigi, kaj tio signifas, ke la tentoj venos nun al vi multe kaj oftaj. Vi devas scii, sinjoro Sinsuke, ke vi ja troviĝas ĉe la vojkruciĝo de la sorto. Se vi ne estos singarda, ne pensema, vi rulfalos pli kaj pli profunden, ĝis vi estos la diablo mem. Se mi diras insiste, ke vi ricevu punon memvole, kaj mi tute ne cedos pri tio, vi ja opinios min senkora, tre malvarma, — mi scias. Sed, sciu, eĉ se vi estus nun savita, certe vi faros ion, — nepre malbonan, kaj ja ne bonan, al vi mem aŭ al la mondo, kie vi vivas. Tio signifas, ke okazos pli da murdoj kaj nenion alian.«

Sinsuke ne povis bone kompreni, kion signifas la admono de Kinzoo. Ĉu li ne konfesis ĉion laŭ sia konscienco? Kaj ĉu li ne montris penton pro tio? Kial do ĉi tio, nun kiam li decidis firme pri tio, kion li devas fari, kion li estis faronta? Li ne povis trovi kaŭzon, kial li timas pri lia malplibonigo estonta. El la plejprofundo de sia honesta koro, li juris kaj juris, ke li nepre donos sin al la lego estonte.

Sinsuke estis kyazaŭ besto, unu fojon incitita, kaj nun rekvietigita; li estis denove viro gentila kaj pacema kiel antaŭe. Li rememoris la okazaĵon de tiu nokto, kiel en songo, kiun li songis en la horoj, kiam lia koro estis plenkupita de terura demono. Li povis fugi, laŭ ilia interkonsiliĝo, kaj serĉi rifugon, ĝis la tempo forviŝos la famon, ĉe in vetludistoj loĝanta en Oomija, Busuu, kun kiu Kinzoo rilatis kiel frato. Sed tio forprenos de ili la ŝancon retrovi Cujā-n. Krome, feliĉe al Sinsuke, la afero videble forpasis ne kaŭzante tre rimarkindan famon en la urbo. Frumatene en la sekvanta ta-

## La blanka pordo

— *Eduard Valenta* —

Ne, sinjorin', ne opiniu,  
Ke venas mi kun almozpet',  
Nek vojaĝist' mi estas, kiu  
Tromplogos vin per loĥbilel',

Pri sap' negocojn mi ne faras,  
Mi ne brokantas pri la vest',  
Nek akvotubojn mi riparas,  
Nek petas mi pri manga rest',

Ne estas mi fripon' senhonta  
Kun ruza pens' pri ŝ'elprepar',  
Nek estas mi student', luonta  
De vi ĉambre'on kun meblar' —

Mi estas tute simpla homo  
Kaj volis preteriri nur,  
Sed en fenestro de ĉi domo  
Jus via montris sin statur',

Mi scias, estis ĝi hazardo,  
Min mem vi lasis sen atent',  
Kaj tamen via ekrigardo  
Plenigis min per ĉarma sent',

La ŝtupoj vokis min invite  
Kaj balustrado kaj la mat',  
Nun sonorigas junigite  
Ĉe blanka pord' mi, nelkonat',

Vi ne atendu almozpetojn —  
Jes, fermu pordon, sinjorin' —  
Mi ne kolportas loĥbiletojn,  
Mi sole volis vidi vin.

El la ĉeĥa: *Miloš Lukáš*.

go de la alveno de Sinsuke, Kinzoo, kvazaŭ okaze, preteriris la stukitan muron, kiu ĉirkaŭis la loĝojn de grandsinjoro Hosokawa. Li ne trovis sangon, kiu kredeble estis forlavita de la dummokta pluvo, nek la ombrelon postlasitan de Sinsuke sur la loko. La sola trovebla afero estis restaĵo de la mangajskatolo de la restoracio Kawaĉoo, disprenita kaj pistita sub piedoj. Rilate la boatiston Seiji, li ŝajnis preni ĉion tiamaniere, ke Santa, plenuminte la krimon, faris ankoraŭ unu paŝon kaj forkuris kun la mono akirita per la murdo de lia edzino. Sekve, eĉ se okaze Sinsuke renkontos la boatiston, ŝajnis, ke li povos certe miregi, sed neniam lin akuzos. Ankaŭ tio esti informo de Kinzoo, sekrete akirita pere de boatisto al li intima. Kinzoo igis la junulon demeti la vestaĵojn de malagrabila memoro, kaj surmeti vintrajn vestaĵojn el lia vestaĵaro. La zorgemo de la maljunulo igis lin eĉ pentri haŭtmakuletojn sur lia vizaĝo.

Alivestite kiel vendisto de pajlosandaloj tage, kaj de makaronio nokte, Sinsuke ĉirkaŭvagis la stratojn, ĉefe en Hukagaŭa, — konsilite de Kinzoo.

Baldaŭ la jaro finiĝis, kaj venis la nova, la oka jaro de la Bunsei epoko.\* Sinsuke ĉiutage vagis en Takabaŭi, ĉirkaŭ la domo de la boatisto. Kiam apenaŭ pasis dudek tagoj aŭ iom pli, jam troviĝis la tria edzino de lia domo, kaj lia negoco prosperis kiel antaŭe. Jam estis nedubeble, ke oni forvendis Ĉuja-n en servuton, Sinsuke konsideris. Por preterlasi neniun ŝancon, li iris al Taĉibana-ĉoo kaj kaŝe rigardis en la bufikon, kie li antaŭe servis. Li trovis, aŭ fantaziis trovi la lokon plena de dezerta soleco, kiam li neniam antaŭe vidis, kaj tie troviĝis, kompreneble, nenia signo pri la juna filino reveninta. Li eĉ aŭdis famon, ke la mastro, korrumpita pro la forkuro de sia filino, nun kuŝas grave malsana, depost la lasta jaro. Tio kaŭzis al li tiel neelporteblan malĝojon, ke li fine decidis neniām plu sin turni al tiu loko.

Li decidis ankaŭ ne serĉi provizore en la ĉirkaŭaĵo de la kanalvojo. Li do serĉis en preskaŭ ĉiuj ĝaj-kvartaloj de la urbo, kaj etendis la serĉmanojn eĉ ĝis Koume, Haŝiba, Irija, sin lokantaj ekster la urbo, kaj travagis lokojn, konatajn pro la loĝejoj de amatinoj kaj pro la vilaoj de urbaj riĉuloj. Kiam fine la dua monato de la jaro estis finiĝonta, ankoraŭ daŭris lia serĉado. Baldaŭ la ĉerizfloroj komencis ekflori laŭ la riverbordo de Mukoojima. Gaza kurteno de nebulo ekpendis trans la paca ĉielo de printempo. Venis plaĉe varmaj tagoj, kiuj ŝajnis ĵeti dolĉan dormenon eĉ sur la viron krietantan ekstere sur la strato pri siaj vendaĵoj. Laŭ la proksimigo de printempo, la koro de Sinsuke akre doloris pro amo kaj malĝojoj. Kaj li terure sopiris vidi ŝin denove, — vidi ŝin, eĉ se nur en sonĝo.

»Sinjoro Sinsuke, ĉu la knabino, de vi serĉata, ne estas kantistino en la kvartalo Naka-ĉoo, — ŝi nomiĝas Somekiĉi?»

Tiun ĝojan sciigon Kinzoo alportis hejmen en iu vespero de la malfrua Aprilo. En la sama vespero Kinzoo regalis, li klarigis, sin kaj siajn du-tri homojn ĉe la restoracio Obana-ĵa, en Hukagaŭa. Unu el la ĝejoj, okaze vokitaj al la kummango, frapante similas al la priskribo, donita al li de la junulo. Estas dirinde, ke la knabino, kvankam ŝi estis malofta belulino, havis palpebrojn iom pezajn, kaj provojn densajn ĝis preskaŭ vira severeco. Kiam ŝi ridetis, ŝia duobla dento sur la dekstra flanko ete aperis sub la supra lipo kaj tio faris la ridentantan vizaĝon tiom pli alloga. Ŝia kutimo iom mordi la lipojn kaj premi la malsupran lipon per dentoj, kiam ŝi ekparolas! Ŝia voĉo riĉa je ĉarmo, kiu ŝajnis apelaci rekte al la homa koro! Tiuj karakterizaĵoj koincidis kun tiuj, kiujn Kinzoo rakontis pri la ĝejoj. Li do iris kaj sekrete informigis pri ŝia deveno. Oni diris, ke vetludisto nomata Tokubei, loganta en la vilago Suna-mura, estis ŝia garantianto. Li elflaris ankaŭ, ke tiu ĉi Tokubei estas fripono kun malnobla karaktero, malŝatata eĉ de siaj samprofesiuloj, kaj ke li ŝajne rilatas la boatiston Seiji, kvankam ne publike, kiel amiko. Ĉio ĉi jam lasis nenion pridubi. Ankaŭ Sinsuke samopinuis.

»Entute ĉio ŝajnas al mi ne eraro. Sed estas io, kion mi tute ne komprenas. Mi timas, ke vi ofendigos pro mia diro, en okazo, se la knabino pruvigis la via, —»

Kun tiu ĉi enkonduko, Kinzoo rakontis pri ŝi la famon, kiam li aŭdis en la ĝajkvartalo. Estis nur antaŭ unu kaj duono da monatoj proksimume, ke la knabino Somekiĉi komencis aperi en Naka-ĉoo; sed pro ŝiaj ta-

\* 1825 post Kristo.

# Prifuĝo

— Lev. Vladyka —

Per sidado oni devas perdi nek memestimon nek aŭtoritaton; Zenon Ojiczski sidis de frua mateno, same kiel ĉiun tagon, kaj laboris. Nur nun, post triobla sonoro, kiu anoncis venon de leteristo, li forŝovis la skribmaŝinon kaj kontente streĉis la krurojn. Lia rigardo glitis laŭlonge de la pentrindaj tegmentoj de antikva Krakova strato kaj poste fiksiĝis al neokulfrapa loko surplafona, kiu ofte estis kvietiga lampo por lia pensado.

Eniris la mastrino kaj alportis poŝtaĵojn. Ŝi leterojn. Ŝire li malfermis ilin sinsekve, neniel vidigante en sia mieno emociion. La tria letero estis de tute nekonata deveno, pri kio atestis la koverto, sed eĉ tio efikis senimprese al la griza viro. Al nekonataj leteroj li estis kutimiginta. Liaj gloro kaj sukcesoj estis akompanataj de tiaj manifestadoj, kaj tial li akceptadis ilin kiel parton de sia profesio. Kelkfoje li tiamaniere eĉ eksciis interesajn detalojn, kiuj helpis la studadon de homa animo. Kaj tio estis rimarkinda pluse por Ojiczski, ĉar li estis konata kiel eminenta literaturisto, kiu famiĝis per kelke da romanoj kun profunda psikologia bazo.

Li malfermis la trian leteron kaj profesiule li rigardis la unuan paĝon. Ĝi estis maŝinskribita kaj sentitola.

»Fine hodiaŭ matene mi saltis sub la lokomotivon numero tricent sesdek kvin. Estis preskaŭ mallume, kiam mi ekiris elhejme. Grandaj gutoj da roso similis al larmoj de la vualita vizago de l' tero. Mi iris laŭ verda vojo inter maturigantaj grenkampoj, ĝis kiam antaŭ mi subite aperis fervoja linio. Surprizis min ĝia ekzisto tiuloka, kvankam ja mi sciis, ke ĝi tie devas esti.

Rigide mi haltis — ĉar ĵus ĝi estis veturanta. Lokomotivo. Peze ĝi spiregis — post si ĝi trenis alte ŝargitan vagonaron.

Nerezistebla forto tiris min antaŭen. Mi kuregis kiom eble plej rapide. Gustatempe mi venis. Transsaltinte fosajon mi ĵetis min sur la relojn.

Ra-ta-ta — ra-ta-ta — bruis la kuplaĵoj en ritmo identa kun la pulsobatoj de mia fandita koro. Tio estis tre stranga. Sed la elŝprucanta vaporo siblis en trankviligaj intervaloj kaj memorigis pri la tempo de feliĉa infaneco.

Ĝi estis tiom dolĉa. Mi emis dormi. Dormi... sendolorigan, longan kaj senvekiĝan dormon. Se nur la reloj postmatene ne sentigus tian malvarmon.

Huuu — la vagonaro transpasis. Mi estis konvinkita, ke mi frakasigis kaj estas morta. Ekkaptis min frosta teruro. Mi timis leveti la kapon — mi ne kuragis ekmovi brakon aŭ kruron. Nur poste mi fermis la okulojn kaj malrapide eklevis la nukon kiel malsana limako, rektigis min en kurbigita timego, mem estante fantomo kaj ombro. Kaj kiam mi tenis la kapon alte super la nivelo de la reloj, subite mi malfermis la spasme kuntiritajn okulojn.

Taga lumo ekdolorigis min.

Okazis nenio. Tute nenio. Do ankoraŭ ĉi-foje ne?! La sekvan fojon mi devos elekti unurelparan fervojlinion, por ke min trafu mia sorto.

Nur reirante al la hejmo, kiam mian kapon ĉirkaŭflugetis konvulsia frostotremo dum ĉiu rememoro, mi decidis turni min al vi. Nun mi kuŝas apud viaj piedoj en hunda humileco, mi ĉirkaŭprenas viajn krurojn — helpu min. Mi petas nek almozon nek senhontan protekton. Sole kelke da vortoj sufiĉos al mi, kelke da vortoj de homo, kiu ĝisfunde jam pripensis multajn destinojn kaj okazaĵojn. Ĉu estas eble forigi la strangan vualon de sur la nekomprenebla kontraŭnatureco de mia animo? Ĉu sukcesos iu per taŭga

lento en muziko, ŝafinda personeco kaj beleco konkuranta kun iu ajn en la tuta kvartalo, oni baldaŭ aŭdis ŝian famon el ĉiu buŝo. Ŝi fariĝis ĉarmo de la loka Juna filo de riĉa ŝtofvendisto de malsupra kvartalo, iu oficiro de la »Hatamoto\* klaso, kaj kelkaj aliaj de la urbo perdis sin pro ŝi kaj konsumis preskaŭ nekredblan sumon da mono, dum ili ludis nur ridindan rolon antaŭ ŝi kaj neniu sukcesis atingi ŝian favoron. Oni konjektis do ĝenerale en la kvartalo, ke la viro Tokubei, enamiginta al ŝi, ĉiam metis sin inter ŝi kaj iu ajn, kiu kaŭzis al li jaluzon. La mastrino, de kiu ŝi dependis, estis neniu alia ol la konkubino de Tokubei. Ŝi kondukis la negocon kun lia kapitalo. Kaj neniu tago pasis sen kverelo aŭ malpaco inter tiuj tri personoj. Kiel rezulto de ĉio ĉi, la mastrino devis fine sin forigi el la domo nur antaŭ apenaŭ dek tagoj, kaj Somekiĉi estis nun la plej grava persono en la domo, tiel gajnante sian lokon inter la ĉefulinoj. Ŝi fariĝis unuaranga gejšo. Kaj oni babilis klache, ke Tokubei estas tro senkora kompreneble, sed Somekiĉi havas kuragon mirinde tro distingantan malgraŭ sia juneco.

Tamen, estas tute dubinde, ĉu ŝi vere sin fordonis al Tokubei, kiel diras la klachemuloj. — aldonis Kinzoo

\* »Hatamoto« estis la korpogardantoj de la Ŝoguno, gubernatoro reganta anstataŭ la Imperiestro; sekve la plej honorata klaso inter la militistoj (japane »samurai«) sub la Ŝoguna reĝino.

sian opinion, kvazaŭ li dezirus doni esperon al la junulo. Estis tre konsidereble, laŭ lia opinio, ke ankaŭ Tokubei spertis tute la samon kiel la aliaj, nur ekscitante sin en amĉaso, kiu kondukis lin al nenio. Sur la objekton de jaluzaj okuloj kutime falas pluvo da senbazaj kalumnioj. Sekve, da, la duono de la famo pri ŝi povis esti rigardata kiel malveraĵo. Laŭ ŝia tenigo vidita de la restoracio, ŝi estis tiel fikuraga antaŭ la homoj, ke li apenaŭ povis imagi en ŝi la knabinon, kreskintan de la riĉa familio de la lombardisto, ĝis antaŭ apenaŭ kelkaj monatoj. Ĉe simpla ekrigardo, de ŝi ne vidigis eĉ ombro de ĉagreno pro la perdita amato, al kiu ŝi fordonis sian korpon kaj animon. Ŝi ridis ĉiam kaj estis gaja drinkante alkoholaĵon aŭvide, kiel nur malmultaj virinoj faras. Se ŝi estus farinta tion nur por venki la kortagrenon, tio ne estas tre malfacila por kompreni.

»Ĉiokaze, tuj iru morgaŭ por ŝin vidi.« Kinzoo diris konklude. »Mi lasis miajn vortojn de Obana-ja, por ke ili zorgu vin, eĉ se vi iras sola.«

La novaĵo pri Tokubei kaŭzis necertan maltrankvilon al Sinsuke, tamen ĉio alia ŝajnis direkti sin al unu punkto kaj al la sama teorio, kiam li pripensis ilin lokene. Forta drinkemo, fikuragemo, nekonvena gajemo, ĉio ĉi estas verŝajna sekvo de ŝia malmoraligo. Kiam aja ŝi malmoraligo laŭaspekto, li ne plendos, li ne zorgos, pensis Sinsuke, se ŝi nur restus al li fidela.

.. (Daŭrigota)

El la japana: J. Sumomura



klarigo Irakasi la flugilojn de l'abomena vampiro, suĉanta mian sangon?

Mi ne estas sinmurdemulo. Eĉ ensonge mi neniam ekintencis adiaŭi la verdajn valojn de tiu ĉi mondo. La vivo estas por mi grandioza donaco, multvalora kaj admirinda. Ho, kia multe estas atingebla per ambaŭ manoj, kian kiomon oni povas primediti kaj transformi en realaĵon de majestaj revoj, kiel egan kiomon oni povas renkonti sur matena irvoĵeto lumigata de goĵo-plenaj sunradioj!

Eĉ amatinon mi havas — se vi volas scii ĉion. Fresan persikon en la ĉarmodora ĝardeno de l' juneco. Vi ne kapablas sumigi la sekundojn, kiuj formas piramidon de ĝuego kaj feliĉo, kiuj mem sufiĉas por tio, ke oni deziru atingi la agon de Metuzalemo.

Kaj tamen min persekutas mia kruela fatalo kaj mi timas, timas, ke mi ne povos ĝin eviti.

Lokomotivo.

Se mi vidas la ŝtalajn pistostangojn kaj la potencan aron da radoj, se mi rigardas la masivan metalbruston kaj la nebrideblan forton kuregantajn antaŭen... mi ne estas savebla. Depost mia juneco persekutas min tiu ĉi fantaziaĵo, mi estas pistata, turmentata kaj torturata, mi fariĝas spirite malforta simiido hipnotigata per furioza rigardo de sagaca pitono.

Sajnas al mi, ke lokomotivo estas kreita sole por tio, ke oni povu sub ĝin salti. Mi estas altirata kaj logata al la du malbenindaj relostrioj, kaj fakte mi tremas pro ia senespera kaj korporema ĝuo, se mi aŭdas bruĝon de rapidantaj radoj. Ĝi estas terura... terura... kaj mi ne posedas forton por liberigi min de tio.

Kiam mi estas en stacidomo aŭ ĉe multe trafikata traveturejo, mi scias reteni la teruran manion furiozantan en mia interno. Hont'e mi evitas la okulojn de aliaj homoj, ĉar mi sentas, ke ĉiuj rimarkas mian malnormalecon kaj ke ili min observas kun speciala atento. Sed tie, kie mi ektrovas min sola nur kun la relparo meze de kampoj, mi fariĝas ludilo en manoj de la sangavida vampiro.

Bonvolu min helpi. Imagu por momento la frenezajn miksaĵojn de timo kaj pasia sopiro, la kruelan ciklonon, kiu min jam mortlacige tedas kaj pri kiu mi scias, ke ĝi nepre pereigos min, se mi ne estos savita nun, en la lastaj sekundoj... «

Ĉi tie la letero estis finita sen ajna ekstera signo. Subskribo mankis. Fino, kiu ne estis fino, same kiel la komenco, kiu estis preterlasita. Stranga deklaro, freneza rakontaĵo, kaj tamen stertoras en ĝi teruro pri nekonataj manoj, kiuj sufoke premas gorgon streĉitan pro konsternigo.

Sed Zenon Ojiczski sidis ĝis nun trankvile. Prudenta malvigleco de lia ago estis fidinda gvidanto de liaj paŝoj. Malrapide li turnis la koverton kaj refoje li rigardis la adreson skribitan per mano relative kvieta kaj sekura. Eĉ postmarko ne estis surgluita. Kiel venis ĉi tien la letero?

Senemocie li vokis, kaj post momento aperis en la pordo lia mastrino, kies rigardo similis rigardon de museto enpelita en angulon.

— Kiu alportis tiun ĉi leteron? — demandis la maljunulo preskaŭ severe.

— Pardonu, sinjoro, mi ne volis akcepti lin. Li estas juna homo; verŝajne li atendis, ĝis kiam venis la poŝtisto. Kaj poste li ektrudis ĝin al mi. Mi opiniis, ke ĝi estas io suspekta, sed li diris, ke mi ne timu, ke



Pentraĵo de Rembrandt

li atendos antaŭ nia dompordo. Ke vi supozeble vokos lin, traleginte lian leteron.

Ojiczski ekmeditis. Lia rigardo nagis super la blua komforteco de sendifekta humoro. Li ne intencis rifuzi la malprudentan senesperukon, sed li pripensis, kion diri al li por helpi lin. Ĝi estis malfacila pripensado, kaj Ojiczski fakte elpensis nenion. Sed la paŭzo saĝis al li esti tro longa kaj pro tio li levitis la mentonon.

— Nu, do enlasu lin.

Post ne tutaj dek sekundoj la pordo malfermiĝis per rapida senbrua puŝo kaj sur la sojlo aperis tre dece aspektanta junulo. Malmulte estis rimarkebla lia interna konfuziteco. Li salutis tre ĝentile kaj nekuraĝe li haltis mallevante la okulojn.

Zenon Ojiczski mansignis al li, ke li eksidu. Kvankam la mieno de l' junulo estis tre konfidema kaj instiga, Ojiczski ne trovis la unuan vorton, per kiu li trarompus la glacieron de siaj duboj. Fine la junulo mem elpensis demandon.

— Mi petas vin, majstro, kion vi juĝas pri tio?

— Ne timu ĝin — ekridetis la flatita majstro.

— Ĝi estas resto de idolkulto en vi. Konscio pri dieco! Versimile, kiam vi estis infano, iu montris al vi lokomotivon kiel modelon de perfekteco teknika. Li sendube estis tre ravita per la koloseco kaj fortego de la maŝino, tiel ke li sukcesis en la infanan fantazion enstampi imagon pri nevenkebla grandeco kaj mireginda povo de la leviloj, radoj kaj ŝraŭboj. Tiel estis preparita bazo por subkonscia adorado...

— Bonvolu pardoni — kuragiis interrompi la juna viro — Jen iometa malkompreniĝo. Nenio el tio, kion mi skribis, estas vera — sed mi interesiĝas pri beletristiko kaj tial mi petas, ke vi afable diru, kion vi juĝas pri tio kiel pri literatura provo.

El la ĉaha: *Milot Lukáč*.

# Edziĝotago

(Gerald Bullett)

Edziĝotago. Eatis strange nerende. Dum li penis ordigi sian kravaton, lia propra vizago regrimacis al li, vizago kiu povus al neniu doni kontenton. »Malgraŭ ĉio mi kelkfoje bedaŭras ke Onklo Edgar mortis«. Li konfidencis al la spegulo, Ronda kaj rozaj, kun fasketo de palbrunaj lipharoj, kiu ŝajnis ne aparteni al ĝi, tiu lia fantomo lin daŭre turmentis. Strange, kiel la virinoj trovas ion admirindan en la viroj. Ekzemple, la sindona amo de Florrie al li: ĝia malracieco, ĝia persisteco, vere ĉagrenis lin. Sen tiu malgranda heredaĵo ili devus atendi ankoraŭ kvin jarojn. Li ja ne volas atendi, tamen... kvin jaroj estas kvin jaroj... oni havus tempon konsideri la aferon. Guste tiu kvindek-funta vivrento aliĝis la situacion; ĝi proksimigis al li ĉi tiun tagon; lia kordeziro, brilanta kiel lumdona frukto sur neatingebla arbo, subite sin klinis al li, kaj lia mano jam pretis ĝin kapti. Sortinflua momento. Pripensoj ĝi ne toleris. Estas ne juste, ke la maljunulo tiel senaverte agis.

»Hola, Bert!« Eksonis laŭta frapo ĉe la dormĉambra pordo, kaj antaŭ ol li povis ĝin respondi, la atakanto eniris tumulte. Li estis granda, ruĝhara viro, evidente vestita por la proksimiganta ceremonio, alta, razita, kun manoj tro grandaj proporcie al lia korpo.

»Hola, elefanto!« Lin agacis lia eniro, tamen iel neklare li gojis pro ĝi. Li volis esti sola kun siaj revoj, sed li timis esti sola kun siaj duboj. Nu, post kelkaj horoj la soleco ja estos afero pasinteca. Florrie kaj li estos kunĉe, en dormo kaj maldormo, en sano kaj malsano, ĝis ilin disigos la morto. Dum kvardek jaroj, eble, kaj neniam sola! Matenmanĝi kun Florrie, trafi la 8.13 al la oficeja kvartalo, la 6.5 revene, malfrue temanĝi kun Florrie, babiladi kun Florrie, vespermanĝi kun Florrie; kaj semajnfine vizitadi la preĝejon, fosadi en la ĝardeno. Nun jam ne eblas eskapo. Eskapo! Kiu volas eskapi? Li ne, certe. Kaj tio estas bonŝanca, ĉar jen Maurice, la jubilanta edziĝkunulo, cetere frato de Florrie. Nenia eskapo.

»Estus bone iom rapidi, mia kara«, diris Maurice, kies vizagon preskaŭ tute dividis granda rido. »Vi ne disponas tiom da tempo, kiom vi ŝajnas kredi. La fiakro ĉepordas.«

Estas bonŝance, li scias, ke la eventfluo lin peladas; alie li starus eterne sin rigardante en sendecida revo. Sed tio ĝenagis lin, ke oni provas lin rapidigi. Li estas ankoraŭ libera, kaj en lia koro ekvivis kolereto kontraŭ la viro, kiu volas ŝiri tiun liberecon el liaj manoj antaŭ la bato de la fatala horo. Ĝi batas tre baldaŭ, sed ĝis tiam... eksajnis al li necese, montri al Maurice sian sendependon. Li jam finis sian tualeton, sed li ankoraŭ iom prokrastos.

»Nu, bone. Nur unu minuton.« Li parolis kun afekta senĝeno, kvazaŭ li alparolus trudeman komercaŭ voĵagiston. Kaj li senrapide prenis de sur la tualettablo malgrandan unĝtondilon. Per ĝi li komencis fortondi sian lipharon.

»Hej, kion vi faras?« demandis Maurice.

»Venis la tempo forigi ĉi ajon«, respondis Bert, ankoraŭ manipolante la tondileton. »Eatu afabla kaj verŝu por mi razakvon. Ne, la malvarma taŭgos.«

La ekstera mondo flumis de somero, signofajro en la griza dezerto de la senlumo, fajrbulo jofita en la mallumon. La ĉielo verŝis belecon sur la rebrilantajn trofuarojn. Sed li restis obstinege enfermita en sia

senemocia introspekto. Kvazaŭ nur li el ĉiuj kreitaĵoj kapablis rezisti la gojinfekton portitan de la varma aero. Kvardek jaroj... kvardek jaroj... La ĉiutageco de la vivo teruris lin. La afabla Maurice iĝis por li simbolo de la ĉiovenka cirkonstancaro.

La Florrie, kiu venis al li ĉe la altaro, estis nova Florrie, vualita, mistera, kaj tial alloga. »Tial«, jen la vorto, kiun emfazis la diablo en lia cerbo. Sed ŝi estis nepre bela, kaj tiel delikata, tiel simila al rava porcelanajo, ke li retenis sian spiron pro ador-timo kiam ŝi donis sian manon en la lian. Jen la belega, senartifika infano kiun, tagon post tago, jaron post jaro, la vivo kurbigos, kaj rompos, kaj fine flankenjetos. Al li apartenos la ŝajna privilegio observi tiun procedon, vidi la harojn grizigi, la vizagon sulkigi, la infanajn revojn morti unu post la alia. Lia koro batis de profunda kompato. Kompatindulino: ili estas ambaŭ en la sama situacio. Ankaŭ ŝi forjuras sian liberecon, prenante sur sin la vualon de ĉiama unutoneco. Kaj, neracie, li kulpigis nek sin nek ŝin, sed la deĵorantan pastron, la gastojn kaj, plej forte, tiun ulon Maurice. Li gojis, ke li ne permesis al Maurice lin rapidigi, gojis, ke li sentas tiun doloretan ĉe la supra lipo, kiu atestas la fakton, ke oni ne sukcesis lin rapidigi.

La pastro, ĉe kies piedoj ili genuis, taktplene rapidparolis pri la naskigo de infanoj. Iu sur malantaŭa benko snufis ploreme. Tio estas sendube la patrino de Florrie, tiu anguleca ekzemplerino de Maurice. Li farigis preskaŭ konfuzita de la dormigaj sonoj eligataj de la pastro, similaj al la zumado de abeloj en hotelo. La sunlumo, enirante tra la kolorvitra fenestro, jetis luman multkoloran desegnon sur la plankon de la altarejo. La koloroj eniris en lin: en liajn okulojn, en liajn naztruojn, eĉ en liajn vejnojn; kaj iĝis lian sangon vibri akorde al ilia brileco. Pala purpuro, kvazaŭ tiu de vinmakuloj; malpala flavo, tiu de la rikoltita greno;

## Kapturigo

— Georgo E. Maura —

En mian vivon simpla kaj ridanta  
iutage vi eniris;  
mi vin akceptis kun saluto danka,  
vin akceptis kaj admiris.

Mi ja ne scias, kian fatdonacem  
al mi portas via mano,  
ke de mi la trankvilon kaj la pacem  
depostulas vi, infano;

mi ja ne scias, ke tra ĉiu vejno  
amvenen voĵiros glite,  
ke en la mez de mia propra hejmo  
mi min sentos ekzilito;

ne scias ja, ke ĉian konfidemon  
mi rezignu jam sufere,  
ke al solena juro la fidelon  
mi perfidu farofere,

ne scias ja, kiom mi devos vidi  
Mi hodiaŭ scias ĝin,  
kaj dubas nun, kiel mi povis vivi  
antaŭ ol renkonti vin!

# STULT-KURAGA

- Stellan Engholm -

En la vilaĝo Laggarbo loĝis viro kun la nomo Gustavo Kuraga. Li estis tajloro, kaj lia korpo estis malgranda kaj miskreska. Liaj kruroj estis kurbaj, maldikaj kaj oblikvaj. Una el la piedoj estis turnita flanken, kaj kiam li iris, aspektis kvazaŭ li moviĝus en du diversaj direktoj. Una el la ŝultroj levigis alten kiel montpinto sur infana pentraĵo, dum la alia deklivis malapren, larĝa kaj kruta kiel la vojo, kiu kondukas al la infero. Li estis malgrasa kaj ostena, kaj liaj vizaĝo kaj kapo estis ĝibaj kiel polurita ŝtano, ĉar baroj ne kreskis sur lia korpo. Krome li strabis, unu okulo rigardis ziele, dum la alia estis turnita al la tero.

Jam en sia junaĝo Gustavo Kuraga tre ŝatis interparoli pri seriozaj aferoj. Liaj vortoj montris, ke liaj lia opinio la homoj en Laggarbo vivas tro libere, sen leĝo kaj fiksa doktrino. Ĉar doktrino mankis, li komencis serĉi tion, por si mem kaj por la aliaj. En tiu tempo ne ekzistis tiam da doktrinoj kion nun, vordire oni havis nenion, ĉar la kristanismo estis nur por dimonĉa uzado. Sed ĉar la kristanismo estis la sola trovinda doktrino, kion li povis preni kiel gvidilon por ŝi kaj siaj samlokanoj, li komencis parkere lerni la Novan Testamenton kaj la psalmaron. Tiam li estis dekokjara. Dum tiu tempo oni malofte vidis lin, kaj lia mastro pleendis pro maldiligento kaj lusa en lia laboro. Kuraga respondis, ke tio eble estas vera, sed tiam laŭzatis lia laboro por pli valoraj aferoj. Lia mastro demandis, pri kio li do okupas sin.

— Vi kudras vestojn por iliaj korpoj, Kuraga tiam respondis, sed mi pretigas vestojn por iliaj animoj.

— Vere tio estas pli valora, la mastro diris. Sed se oni jam cedis al malbona kutimo, estas malfacile ŝanĝi ĝin. Jen, se vi transus la ŝofon erare kaj la vestoj farigis tro malvastaj aŭ pendas kiel sakoj sur la animoj kaj la butonoj elfalus jam la duan tagon! Kiu pekas en malgandaj aferoj, tiu pekas ankau en grandaj. Ĉu vi kredas, ke vi povas kudri vestojn per la animo, antaŭ ol vi povas kudri taĝajn kostumojn por la korpo?

Al tio Kuraga respondis nenion, sed li daŭrigis sian lernadon kiel antaŭe. Kiam li finlernis la Novan Testamenton, li ree komencis montri sin inter la homoj, kaj ĉiam li predikis la doktrinon, kion li ĉerpis el la Skriboj. La vilaĝanoj trovis lin stranga, kaj de-

vis al li la nomon Stult-Kuraga. La krononomo ion post ion fariĝis kvazaŭ vera nomo, kaj ĝial ni skribas ĝin laŭ tiu formo. Ke lia nova nomo fariĝis tia, eble plej dependis de tio, ke li ĉiam parolis pri la kurago kiam oni bezonis por batali kontraŭ la diablo. Lia korpo kaj lia konduto malnulte koicidis kun ilia koncepto pri kurago.

Stult-Kuraga tamen trovis adeptojn. En tiu tempo kelkaj vilaĝanoj vizitis la novan sektaŭ preĝejon en la urbo, ili revenis kun multaj koroj, kaj post la dua vizito ili nomis sin savitaj, parolis per bibliaj esprimoj kaj kantis religiajn kantojn. La nova kredo kaptis pli kaj pli da homoj, kaj post mallonga tempo oni sentis bezonon de propra konstruejo. Tiam oni konstruis la sektaŭ preĝejon de Laggarbo.

Kaj jen la vorto de la Skribo plenumiĝis. Stult-Kuraga, kiu ĉiam estis konsiderata kiel la lasta inter la bravuloj de Laggarbo, fariĝis la unu en la sekta preĝejo. Kaj konstante li daŭrigis la predikadon de la doktrino. «Estas la doktrino, kiu feliĉigas la homojn», li diris.

Stult-Kuraga persiste batalis kontraŭ da senditoj de la diablo. Unu estis la forĝisto Samuel, kion li nomis «ragano de maljusto». La alia estis Petro Vadman, kion li titolis «vagabondo de peko». Troviĝis multaj aliaj pekuloj, sed nenij estis kiel liaj. La aliaj konsentis pri tio, ke la doktrino gvidas al eterna feliĉo, sed tion ne faris liaj du.

\*

Stult-Kuraga malformis siajn spiritajn okulojn. Li ridetis pro la vidaĵo, kiu renkontis lin.

— Klare mi vidas, kion mi vavis, li diris al ŝi. Cio estas, kiel antaŭdiris Lia promoso.

Li promenis antaŭen sur la ora strato en la umbr de la vivarboj, kiuj borderis la rando de la vivivero, kio kun kristalklara akvo fluis en la mezo de la strato kaj estis proksimume same larĝa kiel la veteroj sur ordinara tera strato. Badaŭ li atingis la centro de la urbo kaj vidis tie la tronon, la sadilon, la dekdu plejugulojn kaj ĉion ceteran, kion li jam multfoje vidis en la luno de la kredo. Nur ŝajnis al li strange, ke neniu sidas sur la trono. Sed li ne trovis tempom demandi, kion tio signifas, antaŭ ol venis ŝtelo, kiu transdonis al li harpon. Li komprenis ke li devas ludi, kaj tuŝis la kordojn por aŭdi ilian sonon.

—Ho, mi ne scias. Mi pensis, ke mi pli libere son il.

Maurice, la ĉiopova Maurice, rapide alproksimiĝis. «Ek! li diris vigle. Kial li estas ĉiam tiel ege rapide-tus? Bert kaj lia novedzino komencis marŝi laŭ la flandavaj. Li volis danci: ne pro ĝojo, sed ĝial ke estas tiam malfacile marŝi laŭ la takto de la *Edziĝa Maria* de Mendelssohn.

Ekstere la mondo ankoraŭ flamas. Kaj ĉiuj okuloj gupis. Li helpis Florie en la atendantan fiakron kaj ensaltis post ŝi, dum la rizgraŭnoj tondis laŭ lia dorso. Maurice, la karceristo, fermis la pordon sur ilin kaj poste, kun nekredibla vigleco, metis la kapon tra la fenestroapertura, etendis la kolon, kaj kuis sian fratino sur la vango. «Plej bona sorto, ambaŭ! Li retiriĝis. La fiakro brue skveturis. «Bone, ke mi razis min,» diris Bert sovaĝe. «Komenciĝis la kvardek jaroj

En la angla: K. H. C. Sturmer kaj Alex Ventura

ili sonigis siajn tintilomelodiojn en lia kamato, ĝis li ne plu povis kalkuli la forpason de la tempo.

«Kaj mi esperas, ke vi havos grandan feliĉon. Nun ni iru en la vestiblon.»

Kun Florie kroĉiĝanta al lia brako li iris en la vestiblon; kaj tie ŝvarmo da parencoj, kiel tiom da miel-sorĉantaj abeloj, ilin ekĉirkaŭis.

«Florrie, vi aspektas ravaga!» Bert, vi karugulo! kaj tiel plu...

Alproksimiĝis la pli juna frato de Florie, ĵus fininta la lernejon. «Gratulon, amiko. Si estas bona knabino. Mi ŝin bone edukis. Sed kio okazis al la kriketistinoj?»

Al kio?

«La kriketistinoj. Dek-unu ĉinflanke. Ĉu ne?»

Florrie tradukis. «Viaj lipharoj, Bert. Kial vi burzas ilin? Mi tre bedaŭras tion.»

Li eksentis konsciencoproton. Diabla, kial li for-

# Alessandro Mazzolini †



Li estis unu el la plej bonaj, plej fidelaj, sindonaj, laboremaj kaj valoraj kulturantoj de nia lingvo kaj niaj klopodoj. Mortis je la 15. de februaro en Fano, kie li loĝis de kelka tempo; havis 74 jarojn (naskiĝis je la 28. de februaro 1857), kaj malgraŭ lia aĝo ne plu juna li mortis sur la bastiono. Li laboris forte, kvazaŭ kun impeto vere junaga, ĝis dekseks horoj tage, por Esperanto, kaj por Esperanto li malŝparis siajn fortojn, kun la tuta fervoro de idealisto, ĝis la lasta tago de sia vivo.

La levantoj de la holandaj majstroj el la 15-a jarcento iris Italujon por pristudi la verkojn de *Rafael*, *Michel Angelo*, *Leonardo da Vinci* kaj aliaj, kurgante sian sillon laŭ ŝu de la Italoj.

Unu el ili tamen ne sekvis tiam ekzemplon, sed restis en sia patrujo kaj tie disvolvis sian belegan, fortan talentan harmonian, ke li estas admirata dum ĉiuj tempoj ĝis nun.

Lia nomo estas *Lucas van Leyden* (1494—1533).

Li estas la heroldo de tiu brila epoko, la 17-a jarcento, en kiu komenciĝis la tria epoko de la Holanda pentrarto. Sed kiu li ni devas nomi kelkajn aliajn pentristojn el la 16-a jarcento, kiuj preparas la vojon al ĉiu gloriplena tempo. Ili estas i. a. *Corneilus Cornelisz* (1493—1564), *Jan Suwet van Groningen Miervelt* (1567—1611) kaj *Moorelde*, post kiuj sekvas la intaj antaŭuloj de la penico inter la 17-a jarcentaj pentristoj, nia *Brambrant* (1606—1669).

La politiko kaj religia liberigo estigis novan atmosferon, kaj dum la pentrarto en aliaj landoj estas kaptata en tradicia maniero, ĉi tie oni forĵetas ĉiujn premantaĵojn ligilojn, libere movas sin laŭ propra spontanea okulo, kaj la granda Holanda pentroskolo estas la frukto de ĉiuj spontaneco.

La tujaj antaŭuloj de *Brambrant* estas *Pluus*, *Frans Hals* (1584—1666), *Lustman* (1583—1633) kaj *Van Susanehuuch*, la du lastaj estas konataj kiel instruantoj de *Brambrant*.

Antaŭ el paroli ion pli detale pri la homo, kiu per sia nekomparebla arto regas sian epokon, ni dediĉas kelkajn vortojn al la arto de *Frans Hals*, kies majstroverkoj troviĝas en la muzeo de Haarlem.

*Frans Hals* estas portretisto kaj liaj portretoj estas plenumaj de vivo kaj spirito. Li havas senekzemplan teknikon. Per larĝa penikto li sin liberigas el la glata maniero de la antaŭa epoko kaj lia kolorrikco estas vere brila.

Ni vidas, ke la tempo maturiĝas por maskigi grandan arliston.

*Brambrant* estas vera talentulo, kiu premis siajn mu-

verkaj verkoj, la malica perfidulino sciigis Skobjeljev-on pri la fakto, ke antaŭ du monatoj Obrjadin ricevis el Moskvo dek arĝentajn rublojn, senditajn por Skobjeljev de in lia estinta kamarado (verŝajne vagisto) nuntempe komiza balilisto. Kaj, por atesti sian verdivercon, ŝi montris al li koverton kun kvin sigeloj. Leutenanto Obrjadin, ankoraŭ kiel sama fatalisma adjuvanto kaj kasisto, estis ne nur suspektata, sed ankaŭ akuzata pri ŝtelado de similkaj sendaĵoj, sed li ĉiam sciis kel kaŭ la tinojn en akvon.<sup>6)</sup> Kaj havi famon de honestulo, Skobjeljev, aksciinte pri la ago de la patrokomandanto, venis al li kun la malplena pakajo en la manoj kaj postulis la penitencan monon. La patrokomandanto honoris lin per vangobato, kaj li la patrokomandanton per vangobato. Se ĝi estas okazinta nur inter ili ambaŭ — ĝi estas finita senrezulte, sed ĉar la sono estis en la ĉesto de noblaj rigardantoj, oficiraj, tial la konfuŝiginta leutenanto Obrjadin, arestante la soldatun Skobjeljev, raportis pri la okazintaĵo al la bataliona komandanto. Rezulte de la raporto, oni faris esploradojn, kaj rezulte de la esplorado oni ordonis al la leutenanto Obrjadin eliro el la militservo, kaj la soldatun Skobjeljev oni sendis en militan juĝejon. Kaj laŭ la juĝdecido la soldato Skobjeljev vapasis la verdan akvon,<sup>7)</sup> kiel ĝin nomas la soldatoj, sub du mil

vergojatoj kaj estis ekzilita al Omsk por sep jaroj en arestorojoj.

Malĝoja okazintaĵo kaj, bedaŭrinde, ne sola en sia speco.

Malfeliĉa Skobjeljev! Vi maskiĝis kaj mortis en mallibereco. Vi volis ĝui la larĝan, dolĉan liberecon kaj vi flugis en Edikulon,<sup>8)</sup> vi flugis en mian sepjaran malliberejon kiel birdo-kantisto el Ukrainujo, kvazaŭ nur por rememorigi al mi mian karan, mian malfeliĉan patredanton per viaj dolĉaj kantoj. Malfeliĉa, kompatinda Skobjeljev, vi honeste, noble redonis la vangobaton al la nobla ŝtelistrobato kaj pro la honesta ago vi iris tra vivoj de soldatoj kaj vi forportis la pezajn katenojn al la bordoj de la dezerta Irŝ kaj Oni.<sup>9)</sup> Ĉu vi renkontas en via nova malliberejo same atenteman kaj dankeman atskultanton, unikon de viaj sopiroplanoj, dolĉaj kantoj, kia mi estis? Vi renkontas — sed ne unu tiel saman kia vi, malliberalon-orfulon, somlandanon-puniton, stampitan kiu elverŝos larmoj de dankemo sur viajn pezajn katenojn por la agreblaj al koro, karaĵ, hejmaj sonoj... Kompatinda, malfeliĉa Skobjeljev...

El la ukraina: *Mg. B. Stoleczyk*

datoj kaj estis batata de ili per fresaj vergoj. Ofiĉoj la vergobatojn superis el ĉi milojn.

<sup>6)</sup> tiel kutime nomas la soldatoj la fortikajon Novopetrovskaja.

<sup>7)</sup> Du riveroj en Sibiro.

<sup>1)</sup> i. e. neigi la aferon.

<sup>2)</sup> verda akvo estas speco de estinta puno en rusa armio. Punito estis devigata paki inter du vivaj da sol-

tivojn el ĉiuj landoj kaj epokoj, kaj li volonte ĉerpas el diversaj antikvaj libroj, sed plej multe el la Biblio. Sennombraj estas la pentraĵoj, akvafortoj kaj desegnaĵoj prenitaj el la Malnova kaj Nova Testamentoj.

Super tio li havas senbridan fantazion kaj honoris siajn artofratojn el ĉiuj epokoj.

En lia arkolekto troviĝas verkoj de preskaŭ ĉiuj famaj en- kaj eksterlandaj pentristoj kaj skulptistoj. Kiel vera dotito de Dio, li sortas per lumo, kiun li kreas per mallumo kaj en liaj diafanaj mallumaĵoj neniam mankas la lumo mem.

Liaj akvafortoj same kiel liaj pentraĵoj estas juveloj el teknika vidpunkto kaj kvankam li plene ellaboris siajn pentraĵojn, ili ĉiam restas freŝaj kaj redonas la realan vivon.

Pri lia vivo kaj verkoj la kritikistoj kaj admirantoj plenigis centojn da libroj el kiuj klare montriĝas, ke kvankam li honoras la eksterlan belecon, li pli alte taksas la internan grandecon, la nobelecon de la menso.

En lia Kristofiguro sur la »centguldenbildo« ni ne trovas imponan profeton: Sed la majesto elradianta de tiu simpla figuro estas nesekveble trafa.

Vere, li estas, en la plej profunda signifo de la vorto, klarvidulo; li rigardas en la plej internajn sekretajn de la homa vivo.

Precipe dum liaj postaj jaroj, kiam li, batita de la sorto, devis cedi sian edzinon kaj filon al la morto kaj siajn artotrezorojn al siaj avidemaj kreditoroj, precipe tiam lia produktiveco estas nekredible abunda kaj ekstis liaj plej sublimaj verkoj.

La figuroj en li pentritaj movas sin en mirinda lumo, ĝuste dirite en ia ajn sorĉbrilo, kvazaŭ ili estas ĉirkaŭitaj de fosforeskanta brileco.

Kiel kortuze li desegnas, sur malgranda akvaforto, la profundan suferon de Kristo sur la Monto Olivarba, el tio klare montriĝas, ke ankaŭ li enanime konas tiun malesperon kaj animdoloron.

La franca pentristo kaj kritikisto Eugene Fromentin skribas en sia: »La lasta granda pentroskolo« la ĉi sekvantan trafan priskribon de la Kristofiguro sur la pentraĵo »la Emmaŭsirantoj« trovebla en la Louvre, la konata muzeo en Parizo:

»Kiom multfoje oni figuris la travivaĵojn de lia tera vivo; aŭ pentris la gloron de lia apoteozo! Sed ĉu oni lin iam montris; pala, malgrasiginta, rompanta la panon, kiel li ĝin faris, tiun lastan fojon de la Vespermango en sia pilgrimvesto: kun liaj bluecaj lipoj, ankoraŭ mont-rantaj signojn de lia torturado; liaj grandaj mildbrunaj okuloj, vaste malfermegitaj kaj ĉielen direktitaj; ĉirkaŭita de malvarmeta nimbo, speco de fosforbrilo, kiu envualigas lin en nedifinita glorklumo, kaj kiu tiun nelparolebla ion de vivanto, kiu spiras kaj kiu evidente jam mortis?»

La tenigo de tiu dia reviviginto; tiu nepriskribebla gesto, nepre ne kopiebla; la arda vervo sur tiu vizaĝo sentrajte desegnita, nur per la movo de la lipoj kaj de la rigardo — ĉio el inspiro, oni ne scias de kie, kaj oni ne scias kiamaniere esprimita — ĝi estas de netaksebla valoro.

Neniu arto povas esti komparata kun ĝi; neniu antaŭ Rembrandt, neniu post li, kiu iam tiel esprimis sin.

Sajnas al mi iam enigma, ke la sama kritikisto en la sama libro iom moktone parolas pri la pentraĵo nomata »De Nachtwacht« (la noktgardistaro) kiu en Amsterdam altiras la atenton de ĉiuj vizitantoj de la Regna muzeo.

Ni ne donos detalan nomadon de la centoj da pentraĵoj kaj desegnaĵoj, kiuj estas dissemitaj en la tuta mondo; mi jam tro longe parolis pri li, sed mi faris ĝin, ĉar li estas la centro de mia skolo.

Liaj lernantoj estas multaj kaj el ili ankaŭ multaj farigis famaj pentristoj. Jen kelkaj el la plej famaj.

Gerard Don (1613—1680). Ferdinand Bol (1611—1680). Gerbrand van den Eeckhorst (1630—1674). Fabricius (1614—1654). Nicolaas Maas (1632—1695) kaj multaj aliaj.

Flanke de Rembrandt staras Bartholomeus van der Helst (1613—1670) kies majstroverko »De schuttersmaaltijd« (la festenmango de la civilgardistaro) en Haarlem montras lian majstrecon.

En tiuj samaj jaroj verkis kun granda sukceso i. a. Gerard Terborg (1608—1681) pentristo de familiaj scenoj, salonoj plenaj de Sinjorinoj vestitaj en brilricaj at-lasaj vestoj.

Gabriel Metz (1630—1667). Kaj la neforgesenda origina majstro de ĉi tiu glorplena epoko Jan Steen (1626—1679) ankaŭ pentristo de hejmaj scenoj kaj de bibliaj kaj historiaj pentraĵoj.

Liaj verkoj posedas apartan subtilecon. Li estas gajiga kaj sprita rakontisto, kvankam neniam mankas la vivoseriozeco, kaj kontraŭe ĉiam konservas sian humoron, ankaŭ kiam li pritraktas la plej seriozajn bibliajn historiojn.

Ekster tiuj originaj figurpentristoj, la tiutempa skolo posedas sennombrajn pejzaĝ- kaj bestpentristojn, el kiuj mi nur povas nomi la plej konatajn:

Meindert Hobbema (1638—1709). Jacob van Rysdael (1625—1681). Jan van der Meer (1628—1691). Adriaen van der Velde (1639—1672). Wouwerman (1619—1668) la fama pentristo de militotendarejoj kaj kavaleriaj bataloj. Paulus Potter (1625—1654) kies juna virbovo estas bone konata. k. t. p.

Samtempe verkis en la sudaj provincoj ne malpli famaj pentristoj.

El tiuj ni nomas Pieter Paulus Rubens (1577—1640) oni povas nomi lin la egalulo de Rembrandt. Ankaŭ li estas riĉdotita homo, kiu la mondon pliriĉigis per grandiozaj majstroverkoj ĉie konataj.

Kiel 23-jara junulo li vojaĝis al Italujo, kie li pristudis la italiajn majstrojn Tiziano, Paolo Veronese kaj aliaj. Ilia arto nature influis la lian kaj tial ne estas de tia originaleco ol tiu de Rembrandt, kiu neniam vizitis fremdlandon.

Sed li estas ankaŭ viro de tre granda laboremo. Pli ol 1500 pentraĵojn li pentris, dum ankaŭ en la politika vivo de sia lando li estis grava persono, kiu plurfoje estis sendata, kiel ambasadoro al eksterlandaj kortoj.

Lia tre konata kaj tre kapabla lernanto estas Anthony van Dyck (1599—1641). Kiel delikatsenta artisto, precipe en la portretarto, li ne estas malsupera al sia majstro.

En tiu sama tempo verkas Adam van Noort kaj ties tre konata lernanto Jacob Jordaens (1593—1678) kiu estas bonega koloristo. David Teniers, pentristo de intimitaĵoj kaj petolemaj okazaĵoj en kio la konata Breughel aŭtatenis lia.

Pieter Breughel (1530—1600), kiun oni kutime nomas la kamparana Breughel, kaj liaj filoj, kiujn same, oni pli bone konas sub iliaj alnomoj, la infera Breughel kaj la velura Breughel, estas konataj pro siaj preskaŭ ĉiam petolemaj verkoj.

Kiel lastan mi nomas Adriaan van Ostad, lernanton de Frans Hals, kiu, ankaŭ, en la kamparana vivo trovas riĉan fonton de gajigaj scenoj.

Domage, ke post tiu brila epoko de nia pentrarto komenciĝas tempo de plena dekadenco.

Foje kaj foje ja estas iom da revivigo; sed pri genitoj oni ne povas paroli.

Je la fino de 18-a kaj la komencigo de la 19-a jarcento pli bona tempo komenciĝis. Tuteampe verkis Schotel (1787—1838). Van Schelphout (1778—1870) Dirk Langendyk (1748—1805) kaj aliaj.

La bona konata Pieneman havas multajn kapablajn lernantojn. Lia filo Nicolaas estas la instruanto de la delikatsenta Jozef Israëls (1824—1911), kies verkoj estas de supera kvalito.

Kvankam en liaj unuaj verkoj ni klare vidas la post-signojn de lia majstro, li poste liberigas sin el la tradicia maniero, kaj kreas al si liberan labormetodon.

Kiel kortuze simple li povas redoni la malgajan animstaton kaj la skulptigon en la domo, kie la mortangelo forprenis unu el la familianoj.



# OBSERVO

TARAS SEVCENKO.

(10. III. 1814—11. III. 1861.)

Ni povas konstati, ke ne ekzistas en la mondo alia poeto lirika, kiu povus gloriĝi per tia kaj tiel konstante manifestata honoro, kiun ĝuas de la ukraina nacio — Taras Sevcenko. Nek Shakespeare de la angloj, nek V. Hugo de la francoj, Goethe de la germanoj, Puŝkin de la rusoj, Petöfi de la hungaroj, nek eĉ Dante de la italoj povas revii pri tia tute escepta, neniam dum jarcentoj ie renkontata kulto, kiel Sevcenko de la ukrainoj. Ni malatentas la literaturon pri Sevcenko: la diluvon de disertacioj kaj disertacietoj, analizantaj ĉiun lian poemon, kaj tiujn sennombrajn »komentariojn«, kiuj ŝajnas esti manio de ukrainistoj kaj malfeliĉo de lernantoj en la ukraina lernejo. La centra punkto en la kulto de Sevcenko ne kuŝas en la literaturo pri li, en skribitaj verkoj, do en regiono komprenebla nur al certa klaso de la nacio. Tiu ĉi kulto estas vere amasa, konstanta kaj daŭra. Jen, la societo ukraina en ĉiu urbo kaj en ĉiu vilaĝo, en ĉiu kolonio de politikaj aŭ perlaboraj elmigrintoj en mialnova kaj nova mondo, ĉiu aro sentas la devon ĉiujare, dum marto, kiel dum la datreveno de naskiĝo de Taras Sevcenko, aranĝi »Sevcenkan koncerton«: enkondukan vorton pri la signifo de l' poeto por la nacio, deklamojn de liaj verkoj, kantojn por liaj vortoj, muzikon — ilustrantan liajn inspiroplenajn versojn. Tiu ĉi tradicia kutimo akceptiĝis baldaŭ post la morto de la poeto, kaj jen, dum kelkdekdeko de jaroj — ĉiujare, malatentante ĉiujn kataklismojn de la mondo, la monato marto estas de ukrainoj de ĉiuj religioj kaj de ĉiuj politikaj partioj dediĉata al la kulto de Sevcenko!...

Tiu ĉi homo postlasis unu volumon de poeziaĵoj. Malgraŭ la tuta senduba grandeco de poeta talento — sendube li ne superas multajn aliajn titanojn de monda literaturo. Li ankaŭ ne estis la unua en la nuntempa ukraina literaturo, ĉar lia »Kobzaro« aperis proksimume duonon da jarcento post la apero de »Eneido« de Kotlaŭ revski, komencinta la nacian renesancon de ukraina literaturo. Kiel »sociulo«, komprenu — kiel membro de organizaĵo, Kostomarov ludis en »La frataro de Kirilo kaj Metodo« sendiskute pli grandan rolon organizadan, ol li. Kia sekreto do kaŝas sin sur la fundo de la »Sevcenka kulto«?

El tiu sama tempo ni ankorau nomas *Rosboom* (1817—1891), pentriston de preĝejoj internaj, *Mauve* (1838—1888), pejzaĝiston, *Hochussen* (1814—1894) historio-pentriston, *Van Bors ten* (1825—1892), *Bilders* (1837—1900), *Roelofs* (1832—1897), *Van de Sande Bakhuizen*, *Louis Apol*; ĉiuj estas pentristoj famaj de nia Holanda pejzaĝo.

*Van Gogh* (1853—1890) kaj *Gabriel* (1828—1903), *Klinkenberg* (1852—1924), *Alebe* (1838—1927) kaj nature pli, pli multaj aliaj, kiujn mi pro la longeco de la nomlisto ne povas citi.

Karakteriza trajto de la Nederlandaj pentristoj estas, ke ĉiuj formas unu skolon, kaj ĉiuj sekvas sian propran individuan ideon kaj pentromanieron.

Bona ekzemplo pri tio estas la filo de *Jozef Israëls*, kies verkoj apartenas al la impresionista skolo de la nova epoko.

*Isaac Israëls* estas la antipodo de sia patro. Vera impresionato, furta, impulsigema, tiam senpacienca; kelkfoje li trarapide jetas siajn impresojn sur la tolon; kaj tamen li akurigas la serozan manieron de sia patro, kiu, saviĉe, estas fiera pri la verkoj de sia filo.

En la 20-a jarcento, nia serĉanta epoko, novaj mani-

erbumadis kaj cerbumas ankorau ĉiam pri tio diversaj specialistoj de Sevcenko. Kaj tamen neniu amasa movado, kiu daŭras dekojn da jaroj, estas io hazarda. Kaj la movado de la kulto de l' »Granda Taras« havas siajn profundajn psikologiajn bazojn.

Antaŭ tio, la nacia movado ukraina kaj la literaturo ukraina estas du riveroj, fluantaj en unu flunjo, el unu komuna fonto.

La ukraina nacia-politika renesanco havas sian komencon nek dank' al gajnita batalo, nek dank' al individuo aŭ ara heroaĝo, nek dank' al iu historia kataklismo, sed dank' al la poetoj, kaj precipe al lirikaĵaj poetoj, kiuj kuragiĝis je la heroo ago — je la enkonduko de vivanta popola lingvo en literaturon, anstataŭ la mortinta ukraina-eklezia-slava lingvo. Tio ĉi estas la unua logika kaŭzo por honori la revivigintojn de la literaturo kiel revivigintojn de la nacio: la ukraina lingvo popola, dank' al la literaturo regenerita, rehonorigita kaj suprenlevita al la nivelo de la literaturaj lingvoj de la kulturaj nacioj, fariĝis ja akso de batalo por la kristaligo de l' nacia vizaĝo kaj fundamento de batalo por la nacia-politika ekzistado. Sed la merito de Sevcenko estis ne nur la fakto ke li, la unua el la poetoj de l' renaŝiĝinta ukraina literaturo — kondukis ĉi tiun literaturon tuj al Parnaso. Li akiris la honoron kaj amon de sia nacio ne nur dank' al sia talento, sed ankaŭ dank' al sia kurago, — kaj literature dirante: dank' al la temaro kaj al la sociaj ideoj de siaj verkoj. Li estis nur poeto, sed nacio ne povas tiel honori poeton skribantan per maldensigita inko, aŭ eĉ per la larmino de sentimentalismo. La poezio de Sevcenko akiris per li la kulton de milionoj nur tial, ke en ĝi sonoregas kaj pulsas la sango kaj ĝi mem defluas per la sango!

Sevcenko surpasis la arenon de l' ukraina nacia vivo en la tempoj de servuto, en la tempoj de servuta mallibereco, mem kiel vilaĝano-servutulo, kaj tuj elpasis, kiel apostolo de la popolo, kontraŭ la nacia, politika kaj socia perforto, kaj samtempe, kiel profeto de la vero, kiu evidentiĝos en la renaskita potenco de lia »dormetinta« patrujo. Kaj kiam la poeto, kaŭze de siaj versaĵoj, foriris en ekzilon, kaj de tie sendis al Ukrainujo sopiroplenaj versaĵojn, — ili efikis, kiel manifestoj de la martiro-heroo. Li estis vera profeto de sia popolo. Kaj kun aŭreolo de martira profeto-heroo li tro frue foriris en la tombon, postlasante sian »Zapovit« (Testamenton), kiel duan ukrainan nacian himnon, kantatan dum la revoluciaj 1917/20 jaroj de la amasoj de ukrainaj manifestintoj sur placo de Sankta Sofio en Kijv (Kijovo, ĉefurbo de Ukrainujo) kune kun »Ŝĉe ne vmerla Ukraina.« (»Ankorau ne mortis Ukrainujo.)

Dediĉante okaze de la 120-a datreveno de naskiĝo

eroj ekestas. Ni nomas la faman *J. Th. Toorop* (1860—1931), kies simbolaj verkoj vekas admiron pro la sugestiaj ecoj; *Th. van Hoytema* (1883—1917), *Ploris Verster* (1861—1927), *Thorn. Prückler*, kiu spertis la influon de *Vincent van Gogh*.

Kiel vera nuntempa juna koloristo, mi devas ankorau nomi *P. v. d. Braken*, kies fresaj pentraĵoj radiantaj de brila lumo ĝojigas la rigardantojn. Liaj verkoj ŝajnas naskiĝantaj el senco realeca kaj montras al mi lian poetan imagkapablon.

Eble la lumo venos ĉar ja el la cindro ree ekstaros la senmorta fenikso.

P. S. Ĉe la finigo de tiu ĉi artikolo, la gazetoj sciigas, ke nova tekniko al si vojon trarabatas. En Maastricht en la suda parto de nia lando, la konata pentristo Jan Gregoire elmontras kvindekajn el siaj verkoj; tamen inter ili estas nek oleopentraĵo nek akvarelo.

Li praktikas novan teknikon, ian novan freskon, la-litan aŭ nelakitan.

Jen, la mialnova farigas nova; la grandega historia rado turmigas, turmigadas kaj post jarcentoj eble nova Yan Eyck denove eltrovos oleoteknikon.

Nenio nova estas sub la suno.

de Ševčenko ĉi tiun pagon al la centra individuo de la ukraina literaturo kaj de la fonto de l' ukraina nacia-politika penso, ni intencis konatigi al tutmonda esperantista legantaro tiel grandan kaj tiel ankoraŭ malmulte konatan homon-geinulon.

B. Strelczyk.

(Q) SENSACIO DE L' ARTHISTORIO. La arthistorio havas novan sensacion. En la barbo de la Moseo de Michelangelo, itala arthistoriisto trovis la portreton de papo Julio II. kaj en la bukloj de l' barbo la memportreton de Michelangelo mem. Proksimume antaŭ 400 jaroj kreis la renesanca genio unu el la plej belaj statuoj de l' mondo per tiu Moseo; multege oni skribis pri ĝi, oni ĝin analizis, klarigis, desegnis kaj fotografis. Jam vere ŝajnis ke nenion novan oni povos diri pri la statuo, kiam eminenta pastro-arthistoriisto de la Vatikano, Don Giuseppe Parroni, dum siaj studoj en la San Pietro in Vincoli en pluva, duonmalluma tago, rekonis la aferon.

La malkovro okazis tiel, ke Don Parroni sidigis antaŭ la statuo. Propre li volis skribi pri la Liberigo de Petro, de Domenicchino, kaj pri la Sankta Margareta de Guercino, sed en la pluva duonmallumo li ne vidis bone la bildojn kaj tial — kiel jam tiomfoje — ankaŭ nun li



sidigis antaŭ la statuo. Kiu jam estis foje en tiu ĉi malgranda preĝejo — nomata ankaŭ Basilica Endossiana — tiu facile komprenas sinjoron Parroni; sidi tie silente kaj rigardi tiun terure animkatenantan ĉefverkon de l' arta plenumiĝo estas io tia, kiel rigardi de marborda roko la eterne movigantan kaj eterne senmovan senfinon. Laciĝi eble oni povas pro tio, sed satigi neniam.

Don Parroni sidis en la kan-seĝo preĝeja kaj rigardis la statuon. Foje li rimarkas, kvazaŭ sub la kurbiginta buŝo la oundoj de l' eta barbtufo ricevas difinitan formon, kaj, kiam li rigardas pli atente, jen, disvolviĝas la konturoj de homa kapo. Eĉ ne pasis lia surprizo, kiam el la falegantaj marmoramasoj de l' barbo li vidis disvolviĝi la konturojn de la bone konata profilo de Michelangelo. Kvazaŭ la ombro de lia vizaĝo jetiĝis sur la statuon.

Infera momento! Don Parroni — kiel li mem poste rakontis — ne sciis, ĉu nur liaj nervoj ludas, aŭ li vidis vere ion realan. Li foriris, sed la postan antaŭtagmezon li ree alvenis por rigardi la statuon. Komence li nenion rimarkis, nur kiam ree li sin lokis tiel kiel la antaŭan tagon, iom dekstre de la statuo, li ekvidis klare la homkapon sub la buŝo kaj maldekstre de ĝi la ombroprofilon de Michelangelo. Sed li ne raportis tuj pri sia malkovro. Li venigis fotografiston kaj farigis plurajn fotojn pri la statuo. La fotografa lenso ne povas erari. Kaj sur la fotoj

oni povis klare vidi la kapon sub la buŝo kaj la silueton de aglonaza, barba viro.

Post la malkovro komenciĝis diskuto: kiujn do figuras la bukloj de l' barbo. Pri la portreto baldaŭ evidentiĝis, ke ĝi prezentas papon Julio II. Tio estas senduba. Eĉ se la Moseostatuo ne estus farita por la tombomemoro de Julio II., la simileco al aliaj portretoj de l' granda renesanca papo estas tiel frapanta, ke oni ne povas kontesti la identecon. Michelangelo skulptis tien liajn trajtojn eble simbole, eble el nura arta ludo.

Sed granda estas la diskuto pri la memportreto. La karakterize aglonazan, barban vizaĝon oni povas vidi nur el certa rigardo-punkto. Farinte nur duonpason flanken, oni vidas jam nur kolosajn barbamasojn, falegantajn marmorbuklojn. Precipe bone videblas la silueto posttagmeze, antaŭvesperige, kiam la ombroj jam densiĝas.

Multaj kontestas la malkovron de Parroni, volante prui, ke ankaŭ en aliaj faldoj de l' barbo oni povas magi siluetprofilojn. Sed tiaj klarigadoj ne sukcesis. Pli kaj pli multiĝas la subtenantoj de la opinio de Don Parroni, precipe de kiam ankaŭ Nogara, grandscienca direktoro de l' Vatikana muzeoj, akceptis la malkovron de Parroni.

Kio estis la intenco de Michelangelo per tio ĉi? Ĉu nura arta ludo? Eble aliaj kaŭzoj? Kiu scias? Certe la Moseostatuo gajnis multe da plia intereso per tiu ĉi superema arta artifiko: tri kompletaj portretoj, tri diferencaj karakteroj unuigis en sola kapo. Ardan ludon al tio ĉi similan ne konas la arthistorio. Kvarcent jarojn estis kaŝita la elpensajo de Michelangelo kaj nun hazardo ĝin malkovris. Kiom da surprizoj ni povas ankoraŭ atendi de la renesanco, pri kiu ni kredas, ke ni jam plene kaj tute konas ĝin.

(Q) LA BARAKTADO DE KWEI-LAN. La romano »Dolĉa tero patrina« turnis unue la atenton de la eŭropa leganta publiko al Peare S. Buck, filino de amerika misiisto. Veninte al Ĉinio en sia frua infanaĝo, de tiam ŝi studadas la specialaĵojn de la ĉina raso. Ni diru pli ĝuste: ŝi ne studadas, sed, per konsternaj ekzakta okulmezuro, ŝi fiksis tion, kio okazas en la animo de la indigeno de l' Ĉiela Imperio. Unuflanke la nevenkebla ter-malsato de l' suprenstrebanta kulio, aliflanke la kadukiĝo de l' supra kasto postvivinta sin mem: jen estis la ĉefproblemoj, centraj aktoj en la »Dolĉa tero patrina«.

En sia nova libro, »La baraktado de Kwei-lan«, la aŭtorino elektis novan temosferon. Dum antaŭe ŝin okupis la batalo inter la klasoj de l' ĉina socio, nun ŝi pritraktas la koliziojn inter orienta kaj okcidenta kulturoj, moral-konceptoj, mondrigardoj. Arda malamo kaj arda amo alternas preskaŭ ĉiutage, tra historio riĉa je dramaj turnoj, en atmosfero hejtita de profundaj homaj pasioj. Kaj fine definitive kaj neforviseble fiksigas en nia memoro la dolĉmalgoja vizaĝo de l' eta Kwei-lan. Kaj la aŭtorino, kiu desegnis kun tiel arda mano la figuron de tiu ĉi rompigema, varmkoraj virineto.

La respektindaj prauloj loĝis jam antaŭ kvincent jaroj en tiu pramalnova urbo de l' Ĉiela Imperio. Neniu el ili estis »moderna«, neniu el ili volis ion ŝanĝi. La eta Kwei-lan de imagis sufiĉe simpla la tutan mondon: ŝi estas mi — ŝi pensis — nur tia povas esti ĉiu homo vivanta en la mondo. Kwei-lan vere ne deziris ian ajn ŝanĝon. Tiel alvenis la tago de ŝia edziniĝo. Tio, cetera, ne dependis de ŝia volo: la gepatroj arangis la sorton de l' infanoj jam antaŭ ol ili naskiĝis. Do ankaŭ por Kwei-lan jam estis fiksa la sorto aŭ fatalo. Sed la franco ekpensis ion aŭdacan: iun tagon li tipveturis trans la maron por plivastigi sian scion. Li iradis en multaj malproksimaj landoj, vidis novajn vojojn, eksatis novajn aferojn kaj, reveninte, li rigardis senreviginte la knabinon, kiun li devis baldaŭ edziniĝi.

Fremde rigardas ankaŭ Kwei-lan sian tstantan edzon, kaj fremdsente ŝi aŭskultas liajn instruojn. Sed ŝi igas saga virino. Kaj ekde la unua tago de l' geedza vivo, ŝi klopodas tutkore adaptiĝi. Kvankam tio ne estas facila. Estro kaj ordonanto de l' edzino estas la edzo — lia la



Skrivo. Sed ŝia edzo deklaras: »Mi iras la vojojn de la nova direkto, kaj rigardas vin plene egala al mi; vi ne estas mia havaĵo, nek mia proprajo, sed, se vi volas, vi povas esti mia amiko...« Poste li trovas malbelaj la piedojn de ŝia edzino, kiujn tiel zorgoge ligis malgrandaj la patrino. Kaj turore aperas demandoj, pri kiuj la juna edzo, irinta al Okcidento, havas tre decide formitan apartan opinionon.

Sed Kwei-lan volas adaptigi kaj ankaŭ adaptigas. Ŝi vidas, ke ŝia edzo vere meritas tion. Li ja amas ŝin, gojas pri ĉiu ŝia paŝo, kiun ŝi faras en la direkto de la »nova vojo«, kaj li protektas ŝian edzinon eĉ kontraŭ la anoj de ŝia propra familio. Kwei-lan do iĝas virino inklina al modernigo, eĉ se komence ne tre ŝi komprenas: kial entute necesas tia modernizado. Sed kiam, post sendormaj noktoj kaj senfinaj meditadoj, ŝi formetas de siaj piedoj la ligilojn, kvazaŭ per unu fojo liberigas ankaŭ ŝia animo.

Nun komencigas harmonia gevido, sed Kwei-lan nur paŝo post paŝo povas amikiĝi al la novaj postuloj. Ĉiam la sama vic-ordo: unue ŝi ekkonas la novon kaj terurigas pro ĝi, poste ŝi komencas ĝin esplori tra la okuloj de ŝia edzo kaj rekonas en ĝi la belajojn; fine ŝi alproprigas ĝin kaj komencas pri ĝi entuziasmi. Tiel ŝi observas tiujn konojn, kiujn ŝia edzo komunikas al ŝi pri la mondo; tiel ŝi rigardas ankaŭ ilian ekflorantan amon kaj infanon naskigontan; tiel ŝi akceptas la rigidan kontraŭstarigon al la tradicioj tenante ĉe si sian infanon anstataŭ transdoni ĝin al la gepatroj de l' edzo kiel familian proprajo; tiel ŝi akceptas kompreneme la senekzemplan sakrilegion, ke ŝia frato edzinigas fremdan virinon; tiel ŝi ekprotektas kun varma koro kaj sincera sento la virinon forlasitan kaj malamatan de ĉiu.

Per simplaj, puraj artrimedoj malkovras Pearl S. Buck por ŝia heroino la fremdan okcidentan mondon, kaj kiam paŝo post paŝo ĝi disvolviĝas antaŭ Kwei-lan, ankaŭ la okcidenta leganto sentas sian koron pli rapide bati. Kvazaŭ li mem malkovras la belajojn de l' ĉirkaŭa mondo.

Je la fino de l' historio, intime ŝin trovas la du virinoj: Kwei-lan, edukita en ĉina atmosfero kaj la »fremda virino«. Unu al alia pelas ilin tio, kio estas la sama en ĉiuj virinoj de ĉiuj popoloj kaj tempoj: la amo kaj la patrieco. Jen la du eternaj kaj profundaj sentoj, pli fortaj ol ĉio. Ankaŭ la frato de Kwei-lan ja forlasas sian hejmon, rompas kun la prauloj kaj sanktaj tradicioj, kaj la virino forŝirigas de ŝia familio, kaj patrujo; sed la infano de ili ambaŭ kundenas la koron de l' gepatroj, kiujn senfundaj abismoj de naskigo, raso kaj eduko dividis ekde sentempaj tempoj...

(A) MALFACILAJ TEMPOJ. Grandan sukceson promesis la nova teatraĵo de Bourdet en la Michodiere-teatro. Provizore la teatro ankoraŭ pleniĝadas, precipe ĉar la publiko ankoraŭ anticipas la fidon, baze de la gloro de l' pasinto. Sed la grafikono de la vakantaj seĝoj tamen montras levigan tendencan. La komedio de Edouard Bourdet, skribita por karikaturo la burgaron, tute ne estas komedio, eĉ malpie satiro. La satiro ja troigas la realon, projekteante ĝin en la ebenon de l' komiko. Sed Bourdet, kvankam li ja provis, tute ne sukcesis transtroigi la kompromisemon de l' franca kaj alilanda burgaro. La kazo, kiam li surpluĝigas en sia komedio, ke belan junan knabon oni trudezimis kun kriplulo, ĉar tiu ĉi havas monon, eĉ tre multan monon — tute ne estas troigo.

La vivo literas al ni multe pli drastajn kazojn. Tiel okazis, ke la rigardantoj de la *Temps Difficiles* estas embarasitaj. Rajte, ĉar ili devas sin mem rekoni en la figuroj de la komedio, kaj oni malofte amuziĝas antaŭ spegulo. Ila embaraso montriĝas ekzemple ankaŭ en tio, ke ili ne scias, kiam ili devas ridi. Kaj ĉar ili venis de hejme kun la intenco, ke ili amuziĝos, kaj ĉar ili scias, ke ankaŭ Bourdet havis la intencion (sed la desiron) ilin ridigi. — Ili ridas ĉe tiuj scenoj kaj dramaj turnoj, kiuj postulus prefere seriozan enprofundigon kaj malkulpaden. Male, ĉe la teknike perfektaj komik-pafadoj ili rigardas zintan sin kvazaŭ malhele. Eĉ Viktor Boucher, la favorato,

ne povas rikolti per siaj, alifojte ĉiam certaj, poentoj tiun efikon, kiun li povus atendi.

Estas eble, ke ĉio ĉi ne estas kulpo de l' aŭtoro, sed rezultas el tio, ke la publiko — kiel okazas ofte en revoluciaj kaj historiaj tempoj — trapasas profundan kaj esencan ŝanĝon de gusto kaj valortakso.

(I) ANDREJ BELIJ (Boris Bugaev 1880—1934) estas unu el la plej originalaj rusaj verkistoj. Li naskiĝis en Moskvo kiel filo de profesoro de matematiko. Sed la logiko de la ciferoj ne sukcesis kristaligi lian animon; neniun mondkoncepton, eĉ ne la mondkoncepton kreita de li mem, neniun dogmon sukcesis bridi lian eterne fermentantan spiriton. Jam en la gimnazio lin ekinteresas la pozitivaj sciencoj, li legas Darwin, Spencer, Mill kaj samtempe avide englutas la saĝecon de la jagoj, ŝatas okultismon, esploras budaismon. En la universitato li studas natursciencan kaj poste filologion. Li iĝas kunlaboranto de la simblista gazeto »Vesij« (Pesilo) kiel poeto kaj kritikisto. En 1910 li entreprenas vojaĝon al Italio, Egipto, Palestino. Li konatiĝas kun la gvidanto de antropozofoj R. Steiner kaj restas kune kun ŝia edzino en Dornach, kie oni tiam konstruis la Goetheanum-templon. Dum la milito en 1916 li reveturas en Ruslandon, travivas tie la revolucion, poste vojaĝas al Berlin. La lastajn dek jarojn li pasigas en Ruslando, laborante tie, kiel ĉiam, febre, sed flanke de la avangardo.

Trafoliumante la plej fruajn poemarojn de A. Belij (»Oro en la lazuro«, »Cindro«, »Urno«) oni rimarkas atmosferan simbolikon kaj estetikon de gemoj. Renkontiĝadas vortoj: suno, etero, lazuro, aŭroro, ĉielo, oro, argento, vino, rubeno, safiro, smeraldo, perlo, silko, veluro, flamo. Sed tiam ventblove enigas frosto, vitro, neĝblovado; ĉar neĝblovado kaj flamo ne estas kontraŭaj elementoj en la simboliko de A. Belij. Estus sensence aliri per termometro lian lirikon. Ĉe li la flamo kaj la neĝblovado havas la saman *geston*. Entute la unua distingilo kaj ĉefvaloro de la poezia arto de Belij ja estas la gesto. La konscio estas torde fleksata en liaj versoj, la pensoteksaĵo disŝirita kaj aeren disĵetita. Pere de li antaŭe nekonata kurago kaj impeto eniras la poezion. — La poeto diras, ke la ĉefmotivo de lia poemaro »Urno« estas mendito pri pasemo de la homa ekzisto, ĝiaj pasioj kaj impulsoj. En la »Urno« li kolektis sian propran cindron, ke ĝi ne kaŝu la lumon por la viva »mi«.

Liaj priskribaj kaj aŭtobiografiaj poemoj (»Kristo revivigis«, »La unua renkontigo«) staras sur alta nivelo. Eble ili ŝajnas tro intelektaj, sed esence tiu ĉi intelekto estas nek malvarma, nek statika. En la profundo de ŝia animo A. Belij estas dinamika kaj revolucia: neniun formon, nek formulo plene kontentigas lin. En la rigidajn poezitaktojn li enĵetas novan vivon. La verson, bonedukite paŝantan, li neniam hontante stumbligas. En la versojn li enpelas elementojn de l' prozo, dum la prozon li iĝas kanti. Li eksperimentas en la poezio pere de la muziklegoj, kaj tiel naskigas liaj kvar »Simfonioj«.

Sian plej bonan A. Belij estas tamen doninta en siaj romanoj. En la romano »Argenta kolombo« (1910) li penas solvi la demandon, ĉu oriento aŭ okcidento. En la romano »Peterburgo« (1912) ni trovas la medion de la 1903-a jaro, teozofion, ironion, fantastecon, komplikon, tragikon, groteskon. La verkon regas neĝblovada humoro, senela rapidado. En la romano »Moskvo« (1926) estas priskribita la vivo kaj psiko de la milittempa inteligentularo. Interesaj estas la memuar-romanoj »Kotik Letajev« kaj »Rimarkoj de strangulo« kaj la libro »La fino de la jarcento«. Liaj teoriaj verkoj estas tre interesaj.

Multajn kapablojn katas en si la talento de Belij. Unue oni devas akcenti, ke li estas granda vortmajstro, li estas kvazaŭ magie tentata de la vortmistikio. Belij ankaŭ havas la maloftan scipovon pentri negravajojn per ekstreme intensiveco. — Kio rilatas lian humoron, ĝi estas nek ĉereo, nek ido tra larmoj, nek amara rikano, sed sia-speca romantika ironio. Dum ŝia tuta vivo li estas senlace, plena je kontraŭdiroj, baraktanta en la penso- kaj sentotempoj. Por ĉiam starigi sian piedon sur ia firma grundo li ne povis kaj ankaŭ ne volis.

(X) EL LA VICO DE LA 1934-AJ CENTENARIOJ oni tramonde forgesis la datevanon de la morto de kompatinda monahineto. En Firenze je la 2-a de aprilo en 1634 mortis en la monahinejo de Sankta Mateo *Soror Maria Celeste* dum sia 33-a jaro, — »fratino eksterordinare saga kaj bonanima«, kiel la kroniko diras. Kontraŭ sia volo kaj nur laŭ la deziro de sia patro ŝi fariĝis monahino, kaj ŝi tio ne malhelpis ŝin poste stari kun la plej granda amo kaj insisto apud sia patro konsole, kiam lin oni transdonis al la Sankta Inkvizicio. Nome tiu ŝi monahino estis la filino de Galileo Galilei!

(X.) PAUL MORAND: MONDCAMPIONOJ. Kvar studentoj de la Amerika Columbia-Universitato faras solenan promeson en 1909, ke, same kiel ĝis nun ili atingis rekordon en la diversaj branĉoj de l' sporto, de nun ankaŭ en la vivo ili klopodos por tiu ŝi rekordo. Ili interkonsentas kun sia favorata profesoro, ke ili renkontiĝos ĉiun dekan jaron kaj raportos pri tio. La kvar knaboj estas tute malsamaj laŭ naturo, temperamento, socia pozicio — kaj konforme al tio ĉi ili iras tute malsamajn vojojn. Ĉe la fino de la unuaj dek-jaroj ni vidas, ke *Jack Ram* fariĝis la unua boks-ĉampiono de Ameriko kaj edzinigis fee belan sed malplenaniman, monavidan virinon. *Clarence van Norden* fariĝis la plej fama flugisto de l' mondmilito, *Ogden Webb* atingis grandajn sukcesojn per diplomatia servo en Rusalando, kaj *Brodzsky* — la plej genia inter la kvar — estis en karceroj, ĉar lia genie fondita entrepreno ne povis plenumi la pag-limtempojn. Dum la sekvaj dek-jaroj la boks-ĉampiono mortigas sin; Norden, la flugisto, vivas diboĉe kaj fariĝas senpova sklavo de sia patrino kaj de la vidva belega edzino de Ram; la kariero de Webb — kiu liberigas kaj prenas al si Brodzsky-n — ankaŭ plu levigas. Ankaŭ Brodzsky-n la edzino, la belega Nadine — bankrotigas kaj tiu ŝi demona virino kaŭzas fine ankaŭ la katastrofon de Webb, sur la zenito de l' sukceso. Ekscita, katenarita legajo estas tiu ĉi interesa, lertege verkita romano, la romano de la mondo de l' rekordo.

(X.) DUM LA LASTAJ DEKKVIN JAROJ Germanujo estis la interpretanto inter la rusa literaturo kaj la publiko de la okcidentaj landoj; kaj la produktojn de la malnova kaj same de la nova rusa literaturo la germanaj tradukoj popularigis en Eŭropo. Lastatempe ĉesis tiu ĉi stato. Versajne ne lastrange pro la formiĝo de la politikaj cirkonstancoj apenaŭ aperas verko tradukita el la rusa sur la germana libro-foiro, kontraŭe estas tre interese, ke la lokoj de la germanoj en tiu ŝi rilato — okupis la italoj: en Italujo oni atentis la novajn rusajn aŭtorojn kun granda intereso kaj tre multaj rusaj libroj aperas nuntempe unue en itala lingvo.

## Funebra seligo

Senindulge falĉas la morto en niaj vicoj. En ĉiu numero ni devas funebri pro la morto de eĉ kelkaj el plej konataj esperantistoj. Estas tamen plej malĝoja sento, kiam ni devas funebri la morton de relative tro juna batalanto, kiu estis ankoraŭ meze de nia movado. Duoble ni funebrias pro

### Frans Schoofs

kio mortis nur 45 jara pro subita malsano. Li estis la animo de la belga kaj internacia movadoj. Al lia klopodo estas dankebla la fama Interkonsento de Kolonjo kaj ni speciale funebrias en li malnovan subtenanton, amikon kaj longjaran reprezentanton.

La funebrojn de la familio kaj de la tutmonda esperantistaro partoprenas ankaŭ ni kun malĝoja koro.

## ADMINISTRACIAJ SCHIGOJ

La marto-aprila numero de la gazeto aperis tro malfrue. La kaŭzo estas, ke ni volis nepre finkomposti la unuan volumon de la Enciklopedio, kies kompostado fariĝis multe pli multa kaj komplika, ol ni tion antaŭvidis.

Ni esperas, ke la abonantoj de LM, kiuj estas preskaŭ ĉiuj samtempe membroj de AELA, pardonos al ni tiun prokraston, per kiu ni obligis, ke la unua volumo de la Enciklopedio fine jam post kelkaj tagoj estu preta.

La maja numero de LM kun *Lingvo-Libro* aperos meze de majo.

*S-ro Gurwicz* kaj aliaj mendintoj ricevis la Sturmer-verkon kune kun la maja verko de AELA: Arthistorio, kiu aperos sen ia malfruo.

*S-ro Kolobaŝkin*. Mono el Svedujo ne venis. Tiun de BEA ni ricevis, sed ĝi sufiĉis nur por parto de rekomendkostoj. Ni devis sendi al vi 7 pakajojn, do vi devas alpagi ankoraŭ por rekomendo 0.50 frsv. krome, se vi deziras ricevi Dante tiam 4.40 frsv. kaj la eventualan superpagon por la kompleta Enciklopedio. Pri la apertempo de Enciklopedio vi certe jam legis. Kompreneble la sendita mono per *s-ro Hill* estis la kofizo plus sendkostoj, sed ne kostoj por rekomendo! Tio estas ja tute aparta afero.

## ALVOKO

*S-ano Paul Tarnow*, Düsseldorf ĉi tie alvokas publike *s-ron Ilija Puhalo* el Jugoslavujo, ke li resendu la prunteprenitajn jarkolektojn de la gazeto «La Fervojoisto». *S-ro Puhalo* pruntepetis ilin por ellabori artikolon pri fervojista Esperanto-movado por Enciklopedio de Esperanto kaj malgraŭ ĉiuj ĝisnunaj petoj, rekomenditaj leteroj, li ne resendis al *s-ro Tarnow* la gazetojn, ne plu ie haveblajn.

*S-ro Tarnow* deklaras, ke *s-ro Puhalo* faras malhonestajon, ne resedante la gazeton kaj al tiu deklaro aligas ankaŭ la redakcio de la Enciklopedio. Tiaj agoj malebligas ĉian sciencajn laborojn pri Esperanto kaj ni devas plej akre juĝi personojn, tiel agintajn.

## ANONCETOJ

Mi estas sepjara esperantistino. Sendu al mi poŝtkarton kaj mi sendos al vi mian foton.

Christiane Léger, Ecole Militaire, LES ANDELYS, Francujo.

## ENCIKLOPEDIO DE ESPERANTO

Ni informas ĉiun kunkolaboranton, ke ekde la ricevo de tiu ĉi numero por la literoj A-J ni povas akcepti nenian kompletigon, krom se temas pri grava preseraro, kiu ni povos presi sur aparta paĝo je la fino.

Ne rilatas korektojn de senditaj presprovajoj.

Kompletigoj por la aliaj literoj povas alveni ĝis 1-a de junio.

## Vortoj netroveblaj en la Plena Vortaro

*aplustre* (lat): ornamita ŝpantalano; *bebo*: eta infano; *brizo*: speco de vento; *banta* (Chr): varikolora; *descendi* (Chr): malsupreniĝi; *eskapi* (Grosjean-M.): liberiĝi el situacio; *espulo* (Grabowski): ne malgrava okazaĵo; *introspekti* (Wüster): rigardi en sin mem; *jubili* (Chr): gojkrui; *maena*: preme malhela, malĝaja; *rastrum* (lat): ŝpantalano; *sannita*: praitalia gentano; *suspiri gemaspiri*: stridi (Presa Societo); *akra siblegi*; *stupuro* (Bohrac): rigidigo pro miro, timo ktp.; *stumbli*: falpadiĝi; *trista*: malĝaja.

# GALERIE VAVIN RASPAIL



MAX BERGER  
28, RUE VAVIN,  
PARIS VI<sup>E</sup>

**LA MEMORON PLIFORTIGAS** laŭ metodo trifojne premiita de la Pariza Akademio. Profesoro de mnemoniko D. FAJNŝTEJN, VILNO, Zawalna 15-11 (Pollando). Postulu senpage prospektojn de la memorfortiga perkoresponda kurso en Esperanto.

## PLIVIGLIGU LA GRUPKUNVENOJN!

### ARANĜU LUMBILPAROLOJN

pri **Budapest**, Lago Balaton, Stepo Hortobágy, Hungaraj urboj! — Ankaŭ en ne esperantaj societoj, nacilingve, kun mencio de Esperanto! — (Lumbildoj sur filmrubandoj, normal-filmgrandeco, senpage prunteblaj kontraŭ repago de sendkostoj, **se** la prezento **certigata**. Detaloj ĉe Hungara Skolta Esperanto-Rondo, Budapest, V., Nagy Sándor-utca 6. sz.) Baldaŭ aperos lumbildoj pri la skolta jamboreo!

## Universala Esperanto Asocio

### celas:

*Disvastigi* la uzadon de la internacia helplingvo Esperanto.  
*Plifaciligi* la ĉiuspecajn moralajn kaj materiajn rilatojn inter la homoj sen diferenco pri raso, nacieco, religio aŭ lingvo.

*Krei* internaciajn servojn uzeblajn de ĉiuj homoj, kies intelektaj aŭ materiaj interesoj celas trans la limojn de ilia genta aŭ lingva teritorio.

*Kreskigi* inter siaj membroj fortikan ligilon de solidareco kaj disvolvigi ĉe ili la komprenon por fremdaj popoloj.

La Asocio estas neŭtrala rilate al religio, nacieco aŭ politiko.

### donas:

*Al la membroj:* Membrokarton kaj kvarcentokdekpaĝan Jarlibron kun la adresoj de la Delegitoj, Esperantistaj grupoj, gazetoj, organizaĵoj, kun sciigoj pri internaciaj rilatoj ktp.

*Al la Subtenantoj:* Krom ĉiuj dokumentoj, kiujn ricevas Membro-Abonanto, premion konsistantan el Esperartikoloj literaturaj, sciencaj, teknikaj kaj precizaj informoj pri la movado.

*Al la Subtenantoj:* Krom ĉiuj dokumentoj, kiujn ricevas Membro-Abonanto, premion konsistantan el Esperanto-literaturo.

Ĉiu aliĝinto rajtas senpage korespondan anonceton unufoje en la gazeto »*Esperanto*«,

### kaj postulas nur modestan kotizon

de 5 Fr. por Membro, de 12,50 Fr. por Membro-Abonanto kaj de 25 Fr. svisa valoro por Membro-Subtenanto.

## El la Notlibro de Praktika Esperantisto

nomiĝas nova interesa verko de

### K. R. C. Sturmer

Ĝi prezentas tre interesajn pensojn kaj konstatojn el ĉiuj terenoj de la vivo, ĉefe el la vivo de esperantistoj kaj esperanto, skribita en la formo de taglibro.

La erojn kaj la tutan verkon preselektis

### K. Kalocsay, L. Totsche kaj V. Bleier

Ĉi tiu ankaŭ estas garantio por vi, ke en la libron venis vere interesaj pensoj de la bone konata recenzisto.

La verko ampleksas ĉ. 130 dense presitajn paĝojn sur formato 20×13.5 cm. kun dukolora kovrilo. Prezo broŝurita sv. fr. 2.50, bindita sv. fr. 4 plus 10% por sendkostoj.

Membroj de AELA rajtas aĉeti po unu ekzemplero por 1.— sv. fr. broŝ. kaj 2.— sv. fr. bind. plus 15% por sendkostoj.

Tiu favora prezo rilatas nur AELA-membrojn en 1934-a jaro.

Eldonas Literatura Mondo, Budapest

## LA PIRATO

P E T U S P E C I E M O N I

kaperas ĉiumonate  
Kajeroj por Satiro, Humoro kaj  
Libereco... relativa. — Ŝipestro:  
Raymond Schwartz. Hejma haveno  
kaj administracio: J. Solsona,  
9, rue Hallé, Paris-XIV.

La skulpto-, konstru- kaj pentroarton de la eŭropa kontinento kaj  
la lulilon de la eŭropa kulturo: Mezopotamion, Arabion, prezentas al vi

# ARTHISTORIO

de **ANTONO HEKLER**, profesoro de la Universitato en Budapeŝt

La esperanto-eldonon prilaboris **A. KAMPISS**. Tradukis: **K. KALOCSAY**

En 9 ĉapitroj revuas antaŭ vi la artaĵoj de Egipto, Asirio, Babilonio, Persio, Kreto, Mikenio, Greklando, Italio, Bizancio, la prakistana arto, la mezepoka kaj la gotika arto. — La teksto prezentas al vi la tutan idearon, klarigas la opajn bildojn, iliajn signifojn. Sur la proksimume 100 tekstopaĝoj vi trovos ĉion necesan por klarigi al vi

**la 143 bildojn de la plej famaj konataj majstroj**

el la supre menciitaj arto-skoloj. Ĝojo por la okuloj, instruo por la cerbo:

jen kion sekvis Hekler dum la verkado de la libro kaj tial liaj klarigoj estas majstre simplaj kaj klare instruaj.

La tradukinton ni ne devas aparte prezenti. Ni nur diru, ke li tradukis la verkon, plenan de plej nekutimaj teknikaj esprimoj, per mirige klara lingvo.

Ĝojo kaj ĝuo estos por ĉiu leganto kaj aĉetanto la 2-a verko de Asocio de E-istaj Libro-Amikoj por 1934.

Aperos meze de majo. Amplekso 100 tekstopaĝoj, 112 bildopaĝoj sur glata papero, en formato de 23,5×15,5 cm. Prezo broŝurita svisaj frankoj 13.—, bindita svisaj frankoj 15.—, plus 10%. — Eldonas **LITERATURA MONDO**.

## ENCIKLOPEDIO DE ESPERANTO

Unua volumo  
literoj A—J

estis ekspedata al la AELA-anoj meze de majo kun eksterordinare densa komposto — La unua volumo ampleksas proksimume 272 tekstopaĝojn kaj 128 bildopaĝojn.

Dua volumo  
literoj K—Z

aperos en somero kaj estos preskaŭ 500 paĝa.

**LITERATURA MONDO**  
**BUDAPEST**

## ORIENTA SPIRITO

spiras el la verketoj de unu el la plej modernaj japanaj verkistoj

**K A N K I K U Ĉ I**

En la volumeto, nomata

## AMO DE TOOJUUROO kaj du aliaj teatraĵoj

ni trovas majstre la pentritan vivon de japanaj aktoroj, la japanan moralon, japanajn miraklojn, la religion de Japanujo, tiom strangan por okcidentanoj, tamen tiom similan en multaj detaloj al nia vivo

**OKCIDANTAN LINGVOKULTURON**  
donas al ni en bela, simpla kaj freŝa Esperanto  
**JOŠIŠI ŠIMOMURA**  
la konata tradukisto.

**LITERATURA MONDO** vestis ilin en belan vestaĵon kaj donas la verkon 88 paĝan, en formato 13,5×20 cm. por la prezo de svfr. 1·20+10% por sendkostoj. Asocio de Esperantistaj Libro-Amikoj donas la verkon al siaj membroj por 0·60 sv. fr. afrankita.